

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



Estrara Raporto

**CED: Lingvo kaj
tutmonda edukado**

**Zamenhof
kaj la Honora Legio**

Enhavo

- 101 Historio: Zamenhof kaj la Honora Legio (Roberto Lloancy)
- 102 Lingvopolitiko: Fekunda tero por CED-semoj (Mark Fettes); Du lingvopolitikaj eventoj en Nederlando
- 103 Fakaj asocioj: Novaj servoj spronu malrutinon (Amri Wandel); Movado sen Nomo: Por vivi pli homan vivon (Ivo Durwael)
- 104 Junularo: Pri tutteraj problemoj sur gaela marbordo (Steinthor Sigurdsson); Ge-feoj en Kroatio
Estrara Raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1995
- 105 Ĝeneralaĵoj: Nova estraro stiras pli da membroj
- 106 Administrado: Kvardeka jaro en Roterdamo
- 106 Financo: Ekstraj rimedoj, kreskanta kapitalo
- 108 Kongresoj: La okdeka estis optimuma
- 108 Revuoj: *Esperanto* kun nova vizaĝo
- 109 Eksteraj rilatoj kaj informado: Plifirmigo de kontaktoj
- 110 Landa kaj regiona agado: Veteris malsame, laŭ la klimato
- 111 Junularo: Ĉiu kontribuo bonvenas
- 112 Instruado: La jaro de *Mazi*
- 113 Kulturo: Pli granda kaj varia libromarkato
- 113 Lingvo, esploro kaj dokumentado: Survoje al lingvopolitiko
- 114 Faka agado/Scienca aplikado: Kunlaboremo kreas novajn ligojn
Finaj vortoj: Cedi al nova optimismo
- 115 Financaj aldonaĵoj
- 117 Recenzo: *Sen titolo* (István Ertl)
Foliume
- 118 Laste aperis
- 119 Loke
- 120 Nekrologoj; Anoncetoj

Vi trovis

sur la kovrilo esperantiston kiu malofte gastas tie: Ludovikon Lazaron Zamenhof. La okazon por tio donas historiografia eltrovo de Roberto Lloancy, kiu unuafoje malkovras al la publiko la dokumentojn koncernajn al la aljuĝo de la franca ordeno Honora Legio al Zamenhof. Estis ja sciate ke li ricevis tiun distingon. Li mem skribis ie: "La francan ordenon de 'Honora Legio' mi efektive ricevis" (ekzemplo-frazo en *Plena Ilustrita Vortaro*); sed nun ni tenas en la manoj aŭtentajn dokumentojn pri tio.

Ankaŭ alian ordenon ni origine intencis prezenti al vi ĉi-numere: la nederlanda esperantistino Nora Moerbeek-Bartels ricevis en aprilo la kvinan gradon de la ordeno Oranje-Nassau, pro laboro en la Esperanta movado, precipe blindula. Tamen, pro la ampleksa kaj leginda Estrara Raporto pri la jaro 1995 (p. 105-116) ni devis lasi intervjuon kun ŝi al la sekva numero.

La kovrilo: L. L. Zamenhof kun ordeno, el *Granda galerio Zamenhofa* de Adolf Holzhaus.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktotino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ☎+1-613-565-9279; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎+31-50-3613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎+370-7-228616 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ☎+39-6-39-72-61-69; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Zamenhof kaj la Honora Legio

Dum pluraj jaroj la klopodoj por havigi aŭtentajn dokumentojn kaj oficialajn atestilojn pri la ordeno de la Honora Legio al Zamenhof restis senfruktaj. La arkivaj respondeculoj obstine mutis rilate la oftajn petojn de multaj francaj esperantistoj. Nun fine Roberto Lloancy sukcesis rompi la muron de silento.

Kvankam mia taktiko estis ne menci i Esperanton en mia petletero, por ne veki ian suspekton de iu malbonintenca sekretari(in)o, neniun respondon mi ricevis dum pli ol unu jaro.

Fine, ĉar mi ne povis toleri tiun silenton kaj ĉar mi estis leginta ke la franca prezidento estas laŭstatute la granda

majstro de la ordeno de la Honora Legio, mi skribis akran plendoletaron al la prezidento pri la nedeca kaj daŭra nerespondo al informpetoj flanke de la koncerna kancelario de la Honora Legio, pri kies bona funkciado la prezidento estas la garantio. Afabla respondo alvenis, kaj monaton poste mi havis la grandan plezuron ricevi fotokopiojn de la longe prispirataj dokumentoj, kiujn mi liveras hodiaŭ al la publiko [ĉi-sube en redakcia traduko], opiniante ilin gravaj por nia historio.

La unua temas pri la oficiala deklaro subskribita de la franca ŝtatestro, sola reala atestilo certiganta la oficialan

lecon de la transdono de la ordeno al iu koncernata. Rilate la ordenon al Zamenhof, la dato de tiu dekreto estas la 29-a de julio 1905. En tiu sama tago, Zamenhof estis akceptita de la ministro pri edukado: Jean-Baptiste Bienvenu-Martin. Tiu unua dokumento ankaŭ klare montras ke la proponinta ministro estis ne tiu ĵus menciita, sed la ministro

pri eksterlandaj aferoj, tiam samtempe ĉefministro: Maurice Rouvier. Plie, supre maldekstre kaj mane skribita aperas grava indiko: "atestiloj senditaj la 11-an de oktobro 1905".

La dua dokumento estas la slipo kiu ebligas alfabetan ordigadon de la koncernatoj. La slipo pri Zamenhof portas la numeron 11.198, kiu notas la kronologian ordigadon de la ĵus

ordenita persono. La sama numero retroviĝas mane skribita sur la unua dokumento, antaŭ la nomo. Ni bone notu ke sur ambaŭ dokumentoj Zamenhof, por la franca registaro, estis konsiderata kiel rusa regnanto.

Roberto Lloancy (Francio)



Zamenhof portas ordenon dum akcepto de la Kembriĝa urbestro Stace en 1907. (Foto el Holzhaus, Granda galerio Zamenhofa)

Dokumento 1

La Prezidanto de la Franca Respubliko

Laŭ propono de la Ĉefministro, Ministro pri Eksteraj Aferoj, dekretas:

- Art. 1 – Estas nomumitaj al la Nacia Ordeno de la Honora Legio: (...)
8 – Zamenhof, Louis Lazare, rusa regnanto, okulkuracisto en Varsovio
9 – Zervudachi, Ambroise Constantin, komercisto, greka regnanto;

11.200 – Laszlo, hungara regnanto, pentro-artisto

1 – Wolkoff, Gabriel, kapitano de la Rusa Mar-Armeo, Adjutanto de Vic-Admiralo Doubassoff

2 – kaj Beauregard, Felix, itala regnanto, konsulo de Italio

Art. 2 – La Ĉefministro, Ministro pri Eksteraj Aferoj, kaj la Granda Kanceliero de la Ordeno estas taskitaj, ĉiu en sia kampo, pri la plenumo de ĉi tiu dekreto.

En Rambouillet, la 29-an de julio 1905

Subskribas: LOUBET,


Kunsubskribas: ROUVIER

En aŭtenta kopio,

la Protokol-Ĉefo

[En la marĝeno, manskribe: Atestiloj senditaj la 11-an de oktobro 1905.
Novaj atestiloj Laszlo kaj Drucker senditaj la 6-an de decembro 05.]

Dokumento 2



Traduko: Eksterlandano

N-ro 11.198 Zamenhof, Louis Lazare
Dekreto de la 29-a de julio 1905

Rango de la sama tago [?]

Rusa regnanto, okulkuracisto en Varsovio.

Fekunda tero por CED-semoj

Grandparte nova publiko alŝvarmis la 3-an de majo al la 14-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, kunaŭspiciita de Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj de la Novjorka Unesko-oficejo.

La temo “Lingvoj kaj tutmonda edukado”, same kiel la enplektiĝo de la Internacia Lernejo de Unuiĝintaj Nacioj en la organizan laboron, allogis multajn instruistojn inter la okdedo da partoprenantoj. Se juĝi laŭ la atenta aŭskultado kaj favoraj komentoj, tiu kombino estis plena trafo.

Ekde 1982, la konferencoj celas ĵeti iom da kritika lumo sur la lingvan funkciadon de Unuiĝintaj Nacioj, kunigante anojn de la lingvaj servoj, diplomatojn kaj universitatajn esploristojn por tago da referaĵoj kaj diskutoj. Ĉi-foje UN ricevis iom flankan rolon en la programo, precipe per referaĵoj de interpretisto Stephen Pearl (kiu klarigis ke altkvalita komunikado per interpretistoj postulas ke ĉiu tajlu siajn alparolojn al la bezonoj de la profesio) kaj tradukisto Sergei Tkachenko (kiu montris la ŝanĝon de senco kaj nuanco dum la tradukado de tipaj UN-tekstoj en kvar el la oficialaj lingvoj). Laŭ ili, do, tutmonda edukado konsciigu pri tiaj limigoj al translingva komunikado.

Pli vaste, laŭ Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford) kaj Timothy Reagan (Universitato de Connecticut), tutmonda edukado konsciigu pri lingvoj ĝenerale, pri ilia rolo en kulturo kaj interhoma kompreno, kaj pri la limigita perspektivo de unulingvuloj, eĉ tiuj kiuj parolas la plej potencon lingvon de la mondo. Multaj

referaĵoj fakte aludis al la malsukcesa lingvo-instruado en usonaj lernejoj kaj la ofte naiva aŭ aroganta sinteno de anglalingvanoj rilate al aliaj lingvoj. Tiun situacion esperas plibonigi Christine Brown, la gvidanto de grava tutlanda laborgrupo kiu lastatempe publikigis komunan celaron por ĉiuj lernejoj lingvoprogramoj: laŭ ŝi, ĉiu usona infano ricevu realan ŝancon alproprigi duan lingvon (aŭ trian, se temas pri hejma dulingveco).

Surfumo ne strukturis

Novajn perspektivojn tiurilate prezentis Dominique Lap (Internacia Lernejo de UN) kaj Laura Layton (Lingvotrejna Programo de UN), aludante al la rapida kaj impona evoluo de la komunikad-tekniko. Lapparolis pri kontaktoj inter diverslandaj lernejoj, kiuj ne plu devas limiĝi je simplaj korespondaj rilatoj sed povas naski veran kunlaboron de la studentoj — kaj tiel transformi teoriantingvoscion en aktivan uzadon. Aliflanke, Gérard Roubichou (Franca Liceo) argumentis ke la tekniko ne povas anstataŭi la edukiston sed, kontraŭe, eĉ pligravigas ĉi ties rolon: “Simple surfumi sur la komputilaj retoj, ĉiam pli rapide, kun ĉiam pli da elekto, ne helpas strukturi la menson — [kio estas] la esenco de la edukado.”

Tutmonda edukado postulas ankaŭ tutmondan kunlaboron, laŭ Ridha

Bouabid (Agentejo de Kultura kaj Teknika Kunlaboro) kaj Anita Amorim (Unesko-oficejo Novjorko). Ambaŭ atentigis ke baza edukado estas la fundamento de tutmonda edukado, kaj memorigis ke centoj da milionoj da homoj ankoraŭ ne disponas pri tiu elementa rajto. Ambaŭ donis ekzemplojn de projektoj kiuj reale plibonigas la kondiĉojn por edukado en landoj de la Sudo.

Shirley Klein, la programdirektoro de la Internacia Lernejo de UN, priskribis la disvolviĝon de multlanda reto de “internaciaj lernejoj” — plejparte privataj, tamen ankaŭ kun kelkaj ŝtataj. Dudeko da tiaj lernejoj nun kunlaboras por evoluigi lernoprogramon bazitan sur filozofio tre proksima al la Zamenhofa homaranismo. Cetere, ĝuste Klein realigis, entuziasme kaj talente, grandan parton de la organiza laboro por la CED-konferenco, kunlabore kun du veteranoj: Françoise Cestac, antaŭa asista ĝenerala sekretario de UN, kaj CED-direktoro Humphrey Tonkin.

Esperanto ne estis centra temo de la konferenco, sed rolis en kelkaj referaĵoj, inkluzive de miaj propraj konkludaj komentoj. Sur granda tablo prizorgata de Rochelle Grossman, la partoprenantoj povis trovi abundajn ekzemplerojn de Esperanto-dokumentoj kaj plurajn bonajn librojn. Entute tiu ĉi 14-a konferenco ne nur interese prilumis la elektitan temon, sed malkovis novan kaj fekundan terenon por plua semado.

*Mark Fettes
Estrarano pri CED*

Du lingvopolitikaj eventoj en Nederlando

La asocio Le Monde Bilingue (“La dulingva mondo”) organizis la 12-an de aprilo en Bergen, sub la aŭspicioj de la franca ambasado kaj de organizo por Eŭrop-dimensia edukado en Nederlando, seminarion pri “La lingvodiverseco en Eŭropo: engaĝo kaj perspektivoj”. Lingvistoj Gilbert Dalgalian (Francio), Renzo Titone (Italio) kaj Albert Raasch (Germanio) prelegis al cento da fakuloj kaj interesatoj pri temoj rilataj al plurlingva edukado. La propedeŭtikan valoron de Esperanto prezentis Hans Erasmus (Laborgrupo pri la Lingvoproblemo en EU) kaj

István Ertl (UEA) en du el la postaj kvin diskutrondoj. La sekvan tagon Le Monde Bilingue lanĉis “Alvokon de Amsterdamo”, kiu petas la EU-registarojn “difini lingvopolitikon ĉiukampan”, bazotan unuavice sur antaŭenigo de dulingva edukado ekde frua aĝo. Tio signifas malfermon al kiel eble plej multaj lingvoj, per amasa interŝanĝado de pedagogoj — ne prioritigante, kiel nun, la anglan. Ĉi-okaze oni iniciatis la fondon de Eŭropa Lingva Konsilio, politike sendependa instanco por aŭtoritate subteni tiun lingvopolitikon.

La nederlanda kaj neŭtrala lingvo

La 26-an de marto la kultura asocio Algemeen-Nederlands Verbond (“Ĝenerala Nederlanda Ligo”) okazigis diskuton, sub la gvido de d-ro E. Vervaet, ĉe la Flandra Kulturcentro en Amsterdamo pri “Protektado de la nederlanda en Eŭropa Unio”, kaj — rimarkinde flanke de neesperantista organizo — la “(mal)avantaĝoj de ĝenerala EU-pontlingvo (kiel Esperanto) al la pozicio de la nederlanda”. La publikon duone konsistigis esperantistoj. La 1-an de junio sekvis samtema publika diskuto.

Novaj servoj spronu malrutinon

La diversaj partoj de la Esperanto-movado kompletigas unu la alian rilate ties internan evoluon, sed ankaŭ rilate la informadon kaj kontaktadon kun la nemovada medio internacia, nacia kaj profesia.

Inter la movaderoj apartan rolon ludas organizoj kiuj agas en specifaj fakoj, profesioj aŭ sciencoj, kaj uzas Esperanton kiel komunikilon — la organizoj kiujn oni kutimas nomi “fakaj asocioj” (FA).

En la antaŭa Estraro mankis estrarano pri faka agado, kio bremsis la kunlaboron inter UEA kaj la faka-profesia parto de la movado, speciale kiam temis pri nerutinaj agadoj kaj iniciatoj. Ricevinte la respondecon pri faka kaj scienca agado, mi proponis kelkajn novajn servojn de UEA al la FA, por vigligi la kunlaboron sur la profesia tereno, interne kaj ekstere de la movado. Kelkajn el tiuj iniciatoj detalis aparta cirkulero al ĉiuj FA:

temas i.a. pri helpo por eldoni fakterminarojn, trovi adresojn de eblaj interesatoj, kontakti internaciajn organizojn kiuj okupiĝas pri la sama fako (ekz. neregistara organizo ligita al Unesko), kaj ankaŭ pri pli efika informado pri la FA — per jena rubriko.

De tempo al tempo diversaj FA jam prezentigis en ĉi tiu revuo (fervojistoj: jan. '95, p. 12; komercistoj-ekonomistoj: dec. '95, p. 206; Monda Kunagado: feb., p. 29; katolikoj: maj., p. 87), el kiu la legantoj povas ricevi pli detalan bildon pri tiuj asocioj ol ebligas ilia konciza priskribo en la Jarlibro. Ekde nun la rubriko plioftiĝos — se nur la asocioj mem

kunlabore helpos per informoj kaj sinprezento.

Krome menciindas (kaj utiligindas) du novaj dum-kongresaj servoj kiuj premieros en la Praga UK: speciala Faka kaj Scienca Forumo, (jaŭdon, de 9 h ĝis 10.30), kie FA povos prezenti sin kaj interŝanĝi spertojn pri komunaj temoj; kaj prova disponigo de senpaga “faka giĉeto” kiun interesataj FA dividos inter si. (Sed anticipe informu la Centran Oficejon pri via intenco uzi ĝin.) Pluraj FA entuziasme respondis al la cirkuleraĵo iniciatoj, kio aŭguras impresan forumon en Prago.

Amri Wandel

Estrarano pri faka kaj scienca agado

Movado sen Nomo: Por vivi pli homan vivon

En 1957 Phil Bosmans lanĉis kampanjon por la “Kulturo de la Koro”. Li opiniis ke en la moderna socio ekzistas tro multe da interesiĝo pri materialaj, teknikaj kaj teknologiaj progresoj, dum la emociaj bezonoj de ordinara homoj suferas pli kaj pli.

“Movado sen Nomo” (Bond zonder Naam) fariĝis ege populara en Flandrio kaj havas 320 mil membrojn. La iniciato trovis ĉion en eksterlando, kaj tiel estiĝis similaj movadoj en 12 landoj.

Phil Bosmans mem alparolis kelkajn e-istojn por disvastigi la ideojn de sia movado pere de Esperanto. En 1980 fondiĝis do Movado sen Nomo (MsN) sendepende de Esperanto, kvankam kun financa subteno de Bond zonder Naam por lanĉi. Ĝia unua iniciato nomiĝis “Vitaminaĵoj por la Koro”: homoj kiuj spertis “nigran tagon” povis aŭdi surbendigita mesaĝon kuraĝigan. Sed internacia telefonkontakto estas multekosta afero. La organizantoj rapide devis entombigi tiun ĉi iniciaton. Tiam ni ekdonis la “Levilkartojn”. Ĉiun duan monaton MsN dissendas belan karton kun slogano kaj inspira teksto sur la dorsflanko, kiu instigas nin pensi pri la bezonoj de la koro. La ricevintoj pinglu ĝin en bone videbla loko, tiel ke ĝi servu dum monatoj kiel instigilo por vivi pli “homan” vivon.

Por ne ekskludi iun ajn, MsN dissendas ĉion senpage al ĉiu petanto. Oni povas ĝiri donacon laŭ povo kaj bontrovo.


Por dudirekte kontakti la ricevintojn, MsN eldonas novaĵleteron (ĉiun kvaran monaton), kiu enhavas precipe reagojn.

En kelkaj kazoj MsN ankaŭ materie helpis al samideanoj en Bosnio, Kroatio, Albanio, Zairio kaj Benino. Sed rimedojn por tio ni trovis nur ĉe alia helporganizo.

Ni ankaŭ eldonis tradukon de furora libro de Phil Bosmans, *Ŝanco por feliĉo*, kiu enhavas kolekton da inspiraj kaj kuraĝigaj tekstoj.

Personoj kiuj volas konatiĝi kun Movado sen Nomo (Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio) aŭ regule ricevi ĝiajn eldonaĵojn, nur sciigu tion. Jam 1500 esperantistoj regule ricevas la levilkartojn!

Ivo Durwael (Movado sen Nomo)



Pri tutteraj problemoj sur gaela marbordo

“Paŝi malpeze sur la tero” — tiel titoliĝis seminario de TEJO pri ekologio, okazinta inter la 16-a kaj 23-a de marto en Bothár Buí (Irlando).

Medirilataj problemoj estas tutmondaj. Tutteraj estas la atmosfero kies poluatan aeron ni spiras, la maro, la fontoj de nerenovigebla energio, la metalaj tertrezoroj ktp. Tamen, dum la problemoj ofte estas samaj aŭ eĉ kunaj, diversaj landoj ofte klopodas solvi ilin malsame. Ne okazu tiel almenaŭ en Esperantujo: unu el la celoj de la seminario estis ke junaj aktivuloj kaj interesatoj pri mediaj aferoj interŝanĝu spertojn kaj informojn, konstruante translimajn ligojn.

La partoprenantoj, el 9 eŭropaj landoj, prelegis kaj vigle diskutis pri plej diversaj temoj, ĝeneralaj kaj specifaj: historio de ekologio, rilatoj inter ekologio kaj ekonomio, medi-konscia administrado de entreprenoj, ekologio kaj skoltismo, rajtoj de bestoj, ekologia plibonigo de domoj, problemoj de medi-protektado en Albanio, transportaj aferoj. Ĉi-rilate okulfrapis la fakto ke neniu el la seminarianoj uzis la densan reton de eŭropaj fervojoj plus pramsipon por atingi Irlandon: oni multe malpli koste vojaĝas fluge. Gastprelegis Máire Mullarney, reprezentanto de Irlanda E-Asocio en la Komitato de UEA kaj membro de la irlanda verda partio. Ŝi parolis ĉefe pri “baza enspezo”, ideo

per kiu oni klopodas solvi kelkajn ekonomiajn, sociajn kaj ekologiajn problemojn kiuj ŝajnas jam neeviteblaj en la nuntempa ekonomia sistemo de

de la dua plej alta monto irlanda. En tiu regiono oni multe uzas la gaelan lingvon, kies sorto — traktita en eksterprograma prelego — nepre stimulas pripensadon pri interrilato de lingvoj, kaj pri la aktuala lingva situacio en la mondo. En unu vespero ni ankaŭ lernis tradiciajn gaelajn dancojn.

Por “paŝi malpeze sur la tero”, ni manĝis tute vegetare, ĉar vegetarano uzas la sun-energion ĝis 20-oble pli efike ol manĝanto de viando. Por la plejparto tio estis nova sperto — kaj sperto tre agrabla, dank’ al la kuiraj magioj de s-ino Helen Bartlett.

Helpe de financa subteno de Konsilio de Eŭ-

ropo kaj dank’ al tre bone organizo de Saskia Idzerda (estrarano de TEJO pri kongresoj kaj seminarioj) kaj Daithí Ó hÉalaithe, realiĝis seminario sukcesa kaj instrua, ĝoja kaj stimula.

Steinthor Sigurdsson (Islando)



Foto: Janek Bender

Domo en la irlanda vilaĝo Bothár Buí, inter maro kaj montoj, estis ideala ejo por ekologiaj debatoj.

la unua mondo, kiel senlaboreco, socia maljusteco kaj evitebla transportado de homoj kaj varoj.

Komprenoble, la partoprenantoj ekkonis ankaŭ la naturon kaj kulturon de la belega ĉirkaŭaĵo. Bothár Buí — trovebla nur sur plej detalaj mapoj — situas sur la okcidenta marbordo de Irlando, en la duoninsulo Dingle, piede

Ge-feoj en Kroatio

Legita en la komputile redaktata kaj dissendata *Alp-Adria Ret-Informilo* (Vlado Kamenski; kamenski@cirus.dhz.hr):

Sinsekvaj E-generacioj konas la adreson Amruševa 5, Zagrebo, kie kunvenas i.a. Studenta Esperanto-Klubo, fondita en 1957. Ankaŭ la nunaj geaktivuloj (prezidantino Martina Prelogar, Maja Tišljar, Faruk Islamović k.a.) zorgas pri sekvantoj: dank’ al prelegoj ĉe universitato kaj ĉe la Kroata-Franca Asocio, al artikoloj kaj intervjuo en la gazetoj *Vjesnik*, *Večernji List* kaj *Slobodna Dalmacija*, en marto trideko da gejunuloj aliĝis al kursoj. La longtradicia drama grupo de SEK partoprenis en aprilo konkurson de amatoraj teatroj per *Stilekzercoj* de R. Queneau, prezentota ankaŭ en la Praga UK. La SEK-agadon kompletigas ekskursoj (eĉ montogrimpaj), tradiciaj prelegoj kun lumbildoj, kaj najbarar-ĝenaj maskobaloj. (M. Prelogar)


Kroatia Junulara E-Asocio venigis pli ol 80 gejunulojn el 14 landoj al “Mirolando”, konstruita sur la insulo Lošinj por la daŭro de la 3-a Mediteranea Internacia Renkontiĝo (29 marto - 2 apr.). Pro la temo “Fabeloj”, dum la “fabela balo” svarmis divers-maskaj ge-feoj. ★

Brazila E-Ligo petas al ĉiuj esperantistoj sendi salut-/gratuleter-/pk-ojn al 140 gelernantoj de E-kurso ĉe unuagrada lernejo en Braziljo, en kiu Esperanto estas ekde nun oficiale instruata. La ricevotajn pk-ojn oni poste uzos kaj en ekspozicioj kaj kiel argumenton dum kontaktoj kun la celo enkonduki Esperanton en aliajn oficialajn lernejojn, surbaze de leĝo ĵus promulgita de la Ĉambro de Deputitoj de la brazila ĉefurbo. Adreso: C.E.F.B.M., Cx. Postal 7588 – Sobradinho, Brasília (DF) – Brazilo, 73001-970.

Estrara Raporto:

Universala Esperanto-Asocio en 1995

Sur la sekvaj paĝoj la Estraro de UEA invitas refoje traviĝi la movadon jaron 1995. Dum tiu ekskurso eblos, kompreneble, revui nur tiujn okazaĵojn, farojn kaj evoluojn kiuj plej reliefigis sur la movada pejzaĝo de la Tampeara jaro. Inter elstaraj, foje eĉ historiaj raportindaĵoj enviciĝas ankaŭ detaloj el la rutina ĉiutago de UEA. Temas ja pri oficiala jar-raporto, kiun la Estraro prezentas al la Komitato por trakto en Prago. Por ŝpari spacon, la raporto ofte resendas la leganton al artikoloj aperintaj pli frue en tiu ĉi revuo.



Esperanto-kursanoj de Yao Afantchao en la lernejo Le Salut (Togolando)

Ĝeneralaĵoj:

Nova estraro stiras pli da membroj

STRUKTURO KAJ KONSISTO

La Komitato akceptis aliĝon de du novaj landaj asocioj, Rumana Esperanto-Asocio kaj Unuiĝo Togolanda por Esperanto, kaj kunlaboran kontrakton kun Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj. Pro malaktiviĝo de Universala Artista Ligo de Esperantistoj nuliĝis ĝia aliĝinteco al UEA. Sekve, jarfine estis 56 aliĝintaj landaj asocioj, 8 aliĝintaj kaj 34 kunlaborantaj fakaj asocioj.

La nombro de individuaj membroj (IM) kreskis per 201 kompare kun 1994. Estis 7237 IM en 112 landoj. Ilia konsisto: 444 Membroj (M) kun Gvidlibro, 1532 M kun Jarlibro, 410 junaj M kun Jarlibro, 3577 M-Abonantoj, 310 junaj M-Abonantoj, 877 Dumvivaj Membroj (DM), 19 junaj DM, 57 Honoraj M kaj 11 M de Honora Patrona Komitato. Laŭlanda statistiko aperis en marto 1996 (p. 46).

La ricevitaj IM-kotizoj (aliaj ol DM) sumiĝis je 342 734 gld., t.e. nur

77 gld. pli ol en 1994, malgraŭ la kresko de IM kaj iom pli altaj kotizoj. Tion ĉefe klarigas la pli granda proporcio de IM en landoj por kiuj validas la plej malalta tarifo B: de 28,6% en 1994 al 33% en 1995. Ĉar la B-kotizantoj estas plejparte ekster Eŭropo, kaj sekve en la plej kosta afrankotarifo, tiu tendenco estas finance negativa. Necesas do pli efike varbi en riĉaj landoj por eviti kotizplialtigon por la plej bonfartaj el la landoj kun tarifo B.

La aligitaj membroj (AM) nombris 13 808, t.e. 687 malpli ol 1994. El ili 2562 estis AM de TEJO (-429). En 1994 estis malfondita Slovaka E-Asocio, kiu en tiu jaro ankoraŭ pagis por 1020 AM. La nombro de AM en aliaj landoj do kreskis pasintjare per 333, kio ŝajnas indiki halton de la konstanta falo de AM de post 1987.

Al la Honora Patrona Komitato estis invititaj Reinhard Selten kaj Humphrey Tonkin. Naŭ aktivuloj fariĝis Hono-

raj Membroj: Georgo Abraham (Argentino), Barbara Cvetkova (Rusio), Elfriede Ernst (Belgio), Joachim Giessner (Germanio), Adamo Goralski (Venezuelo), HAN Moo-hyup (Koreio), Julius J. Manson (Usono), Hugo Röllinger (Germanio) kaj Eduard Tvarožek (Slovakio). Forpasis la Honoraj Membroj Kiril Draĵev, Douglas B. Gregor, Irja Klemola, Oskari Lehtivaara, Edward Symoens kaj Josef Vondroušek.

Inter ĉiuj kotiz-kategorioj la plej grandan proporcian kreskon notis Societo Zamenhof. Dank' al intensa varbado ĝi arigis 270 membrojn (+114). La kotizoj de tiu mecenata kategorio sumiĝis je 48 751 gld. (+20 794). Kiel tradicie, en la UK okazis festeca akcepto por SZ-anoj. Ili krome ricevis leteron de la prezidanto, kune kun nova membrokarto, kaj la Jarlibron kun plasta kromkovrilo.

La delegitaro de la Jarlibro 1995 konsistis el 2166 individuoj en 87 landoj (1994: 2182 en 86 landoj). Estis

42 ĉefdelegitoj, 1122 delegitoj, 159 vicdelegitoj, 68 junularaj delegitoj kaj 1567 fakdelegitoj. En Brazilo funkciis 4 regionaj delegitoj. Post 4-jara preparado la Komitato akceptis novan regularon pri delegitoj, kiu i.a. difinis 3-jaran oficperiodon ankaŭ por ili. En oktobro ĉiu malnova delegito ricevis novan respondilon, kiun devis pleniĝi ĉiu deziranta kandidatiĝi por la periodo 1996-1998. Kvankam la postuloj de la nova regularo en si mem apenaŭ estas pli striktaj ol antaŭe, la direktoro de la CO kaj la ĉefdelegitoj devas pli severe observi ilian plenumadon. Sekve estis atendebla malmultiĝo de la delegitaro en 1996.

GVIDORGANOJ

La nomlisto de la Komitato kiu funkciis ĝis la Tamperea UK aperis en la Jarlibro 1995 (p. 13-17). Ĝi konsistis el 58 A-, 8 B- kaj 15 C-komitatanoj. Estis krome 8 observantoj. Nomlisto de la nova Komitato, kiu deĵoros ĝis la UK en 1998, aperis en sept. (p. 147), kun 57 A-, 8 B- kaj 13 C-komitatanoj. Poste aldoniĝis komitatanoj A por Argentino kaj Rumanio, tiel ke jarfine estis 80 komitatanoj kaj 7 observantoj. La kunsidojn en Tampereo partoprenis 65 komitatanoj aŭ anstataŭantoj. Krom elekto de nova Estraro, al iliaj plej gravaj decidoj apartenis akcepto de novaj regularoj pri kongresoj, pri delegitoj kaj pri Rondo Familia.

La malnova Estraro konsistis el 6 membroj (Jarlibro 1995, p. 17). Ĝi kunsidis dum tri tagoj fine de marto en Roterdamo (majo, p. 81) kaj mallonge en Tampereo. La nova Estraro havas 7 membrojn, prezentitajn en sept. (p. 149) kaj nov. (p. 181). Krom kunsidi dum la UK, ili kunvenis por du tagoj en Roterdamo (30 sept.-1 okt.; nov., p. 182). Rimarkinda estas la efika informfluo en la nova Estraro, ĉar plejmulto de ĝiaj anoj povas komuniĝi retpoŝte. Krome, komence de decembro dissendiĝis la unua numero de dumonata inter-estrarana novaĵ-letero.

Listo de komisiitoj kaj komisionoj aperis en la Jarlibro 1995 (p. 22-25). En Tampereo la Komitato starigis komisionon pri lingvopolitiko (D. Blanke, A. Wandel, M. Fettes, Yamasaki S.) kaj elektis nov-konsistan komisionon pri financo (M. Delforge, G. Polerani, F. Witdoeck). La Estraro nomumis H. Huppertz komisiito pri regularoj.

Administrado: Kvardeka jaro en

PERSONARO

La stabo de la Centra Oficejo restis senŝanĝa, kun 12 dungitoj, el kiuj 3 laboris partatempe, tiel ke la suma laborforto ekivalentis al 10,4 plentempaj deĵorantoj. Krome, pluraj volontuloj kontribuis per sia helpo, kvankam la uzadon de tiu fonto de ekstra laborforto daŭre bremsas nesufiĉeco de la Volontula Fondaĵo.

EKIPAĴOJ

La Librotena Fako ricevis personan komputilon, kiu ebligas rekte konektiĝi al bankoj kaj tiel administri la bankokontojn de UEA pli rapide kaj efike. Por plifaciligi la kreskantan uzon de retpoŝto, oni aĉetis novan, pli rapidan modemon.

DOMO

Ampleksaj laboroj okazis en la domo. Kadukiĝinta tegmento postulis fundan

riparon, kaj malnovaj fenestroj estis anstataŭigitaj per duoblavitraj. Unu el la sekvoj de tiuj laboroj estas ŝparo de hejtenergio, kio post certa tempo repagos la investon.

SERVOJ

La Jarlibro aperis meze de majo kun 296 paĝoj. Ĝiaj unuaj 96 paĝoj aperis ankaŭ kiel aparta depreso, sub la nomo *Gvidlibro tra la Esperantomovado*. En la strukturo de la Jarlibro ne okazis ŝanĝoj. Ĝojige, la enspezoj pro anoncoj sumiĝis je 16 060 gld., t.e. 11% pli ol en 1994, kvankam la anonc-varbado daŭre ne estas sufiĉe aktiva. Nur ses landaj asocioj profitis de la rabato por aperigo de mapo, sed ĉar temis pri landoj kun multaj delegitoj, la mapoj kovris 37% de la delegitaro. Tre malmultaj kluboj uzas la eblon anonci pri siaj kunvenoj en la Jarlibro (91 en 1995).

Financo: Ekstraj rimedoj, kreska

(Respondeca estrarano: Bakker, poste De Geus.)

SPEZOKONTO

En 1993 la Komitato faris decidon kiu ekde tiam markas la financon planadon en UEA, nome laŭgrade redukti la buĝetitan negativan saldon. Realigiti tion ne estas simple, i.a. pro la neoportuna temposkemo de buĝetado en UEA. La Estraro faras buĝetproponon kutime en marto, kaj la Komitato decidas pri ĝi en julio. Kvankam pluraj gravaj faktoroj, ekz. membronombro, estas relative stabilaj kaj antaŭvideblaj,

la frueco de la decidoj lasas spacon al malcerteco pri faktoroj ekster la reĝo de UEA, ekz. la evoluo de valutkurzoj kaj interezoj. Kvankam ankaŭ en la proksima pasinteco ne mankis negativa influo de eksteraj fortoj, eblis elimini ĝin per ŝparoj aŭ kreo de ekstraj rimedoj. Sekve la Estraro lastatempe ne devis proponi buĝetajn amendojn, kvankam pro la specialaj kondiĉoj de buĝetado tio povus en iu jaro esti neevitebla.

La bona financa rezulto de la Tamperea UK fortigis la kongresan rezervon de UEA.



Foto: Mauro Heiskanen - Kuusmanu Ky

Roterdamo

La malnetaj vendoj de la Libroservo atingis 255 476 gld. (248 441 en 1994), kun neta gajno, antaŭ la deskribo (vd. "Financoj", ĉi-sube), de 90 635 gld. (92 834 en 1994). Aldoniĝis 6083 gld. kiel profito de la abon servo, pro perado de gazetoj aliaj ol tiuj de UEA. En 1994 la abon servo gajnis 4369 gld., sed pro tre neregula fakturado fare de la perataj gazetoj la ciferoj ne estas kompareblaj. Plu daŭris la pozitiva influo de vendo-kampanjoj al elektitaj celgrupoj. Escepto tamen estis oferto al ĉ. 300 E-klubo, kiun utiligis nur tri el ili.

En majo kaj novembro la CO aranĝis Malferman Tagon. Tiu en novembro festis la 40-jaran ekzistadon de la CO en Roterdamo kaj allogis pli ol 100 vizitantojn, kiuj utiligis la servojn de la Libroservo por 6154 gld.

Ĉe la Eldona Fakoj aperis nur *La aboco de tempoplanado* (L.J. Seiwert)

kaj suplemento al *Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko* (E. Symoens). Krome, Rondo Familia eldonis *Dulingve — pli simple*

de E. Csiszár. La neta rezulto de la Eldona Fakoj malkreskis de 9834 gld. en 1994 al 6023 gld. (antaŭ la deskribo) en 1995.




Foto: Ingrid Eit

Unu el la maloftaj ripoz-momentoj por la juna norvego Kjell Heggvold Ullestad, kiu volontulis ekde aŭgusto por TEJO kaj UEA.

nta kapitalo

Pro la eksteraj fortoj ne eblas garanti ke la Spezokonto ĉiujare efektive produktu negativan saldon malpli grandan ol en la antaŭa jaro, eĉ se la buĝeto celas tion. Tia tamen estas la evoluo jam de post 1991, en kiu jaro la kostoj superis la rimedojn per 88 009 gld. En 1995 la minusa saldo de la spezoj estis 29 719 gld. (3,2% de la kostoj kompare kun 9,8% en 1991).

Notindas ke la pasintjara defcito estus multe malpli alta, se ĝi rezultus nur el la kostoj kaj rimedoj kiujn antaŭvidis la buĝeto. La kresko de rimedoj al 900 000 gld. anstataŭ la buĝetitaj 870 000 gld. permesis realigi du tre bezonatajn aferojn, kiuj ne troviĝis inter la buĝetitaj kostoj. Temas pri deskribo je 1% (6 300 gld.) de la stokoj de la Libroservo kaj Eldona Fakoj, kaj pri

. Tiu rezervo celas krei bazon por financi pensi-aranĝon por la oficistoj aldone al la modesta ŝtata pensio.

BILANCO

La valoron de la asocia kapitalo favore influis la kurzevoluo de valor-paperoj, kaj negative la saldo de la Spezokonto kaj deskribo de 20 000

gld. de la stokvaloro de la Libroservo kaj Eldona Fakoj. (Tiu bilanca deskribo estis unufoja, diference de la spezokonta deskribo, ripetota ĉiujare.) Sume la influo estis pozitiva: la bilanca rubriko Kapitalo kreskis de 785 561 gld. en 1994 al 828 984 gld. en 1995 (+5,5%).

La malnova Estraro ekaplikis politikon de konsekvenca plifortigo de la Kapitalo Dumvivaj Membroj (KDM). Tiu politiko portas fruktojn: KDM pasintjare atingis 765 584 gld., t.e. preskaŭ duoblon de tio kion siatempe heredis la malnova Estraro. Ĉar la dumvivaj membroj emas malmultiĝi, la kresko de KDM ebligas laŭgrade pligrandigi la sumon kiun ĝi pagas al la Spezokonto por kompensi la kostojn pro la servoj al la dumvivaj membroj. Same kiel en 1994, tiu kompenso estis duono de la nederlanda MA-kotizo por ĉiu DM, sed unuafoje ĝi koncernis ankaŭ la honorajn membrojn kaj la Honoran Patronan Komitaton.

Ĉe la rezervoj notindas — krom la kresko de la pensia rezervo — grava plifortigo de tiu por UK-oj (de 75 615 al 93 434), dank' al la bona rezulto de Tampere.

Al la Tamperea UK ŝuldiĝas ankaŭ la plej ĝojiga evoluo inter la fondaĵoj: la Propaganda Konto finis la jaron per

saldo pli ol duobla kompare kun 1994. Fondaĵo Azio, tamen, registris debeton. Tio signifas ke ĝiaj elspezoj superis la renton de Kapitalo Azio, kiu estas la fonto de ĝiaj rimedoj. Necesas do en 1996 bridi la elspezojn de la azia agado por restarigi ekvilibron. Fondaĵo Junularo, pri kiu disponas TEJO, praktike malpleniĝis. Tio okazis pro nericevo de subvencio de Eŭropa Junulara Fondaĵo ĝuste en la jaro kiam TEJO starigis oficejon en Bonn kaj tial komencis elspezi multe pli ol normale (vd. "Junularo", p. 111.).

Inter la fondaĵoj troviĝas ankaŭ Konto Espero, kies bonhavo tamen estas rezervita ekskluzive por esperantistaj viktimoj de militoj kaj naturkatastrofoj. En 1995 ĝi disdonis je 9 380 gld. pli da helpo ol estis la sumo de la samjare kolektitaj donacoj.

INSTITUCIO HODLER '68

La Institucio, kiun oni starigis por finance subteni ĉefe UEA, asignis 7000 gld. kiel subvenciojn. Ricevis ilin Fondaĵo Canuto, Volontula Fondaĵo, eldono de libro pri Zamenhof/Esperanto-objektoj, Eŭropa Esperanto-Unio kaj la simpozio "Etnoj kaj Naturo". La Institucio posedas domon en Antverpeno, kiu estas ludonita al Flandra E-Ligo kaj E-klubo "Verda Stelo".

Kongresoj: La okdeka estis optimuma

(Respondeca estrarano: Lipari.)

La 80-a Universala Kongreso okazis en Tampere (Finnlando) de la 22-a ĝis la 29-a de julio kun 2443 aliĝintoj el 68 landoj. Ĝi estis unu el la plej bone organizitaj UK-oj ĝis nun. La sukceso ŝuldiĝas al la LKK, kiu ek-laboris jam 4-5 jarojn anticipe kaj i.a. okazigis kvin trejnseminariojn, ĉiam kun partopreno de pluraj dekoj da helpontoj.

La Alta Protektanto Martti Ahtisaari, prezidento de la respubliko, estis ankaŭ laŭreato de Premio Zamenhof. Delegacio de UEA kaj de la UK vizitis lin por transdoni la premion.

La Kongresa Temo “Ni, la popoloj” — unu mondo aŭ disaj eroj? — omaĝis al la 50-jara jubileo de UN. En pluraj kunsidoj oni traktis diversajn aspektojn de ties agado. La konkludoj de tiuj diskutoj eniris la rezolucion de

la UK. Okazis krome junulara Modela Asembleo de UN.

La tre bunta programo inkluzivis, ekzemple, dudekon da koncertoj kaj kvar teatraĵojn. Rimarkinde abundan sortimenton prezentis la programero “Libroj de la jaro”. Ankaŭ la junulara programo estis nekutime riĉa.

Bonege funkciis la gazetara servo (vd. “Eksteraj rilatoj kaj informado”, p. 109). La kongresa kuriero *Vekilo Kongresa* aperis, kiel la titolo indikas, ĉiumatene.

La loĝiga servo funkciis sen perantaj agentejoj inter la LKK kaj kongresanoj, kio certigis favorajn prezojn kaj bonajn servojn. Ankaŭ la ekskursojn kaj la postkongresojn preparis la LKK mem. Ĉio ĉi kontribuis al bona financa rezulto, t.e. profito de 197 300 gld. El tio 19 700 gld. iris al la Kongresa

Rezerva Fondaĵo, 88 800 gld. al la Propaganda Konto de UEA, 53 300 gld. al la Tampere klubo kaj 35 500 gld. al E-Asocio de Finnlando. Tio donas sekuran bazon por estonta agado de la finna movado kaj signife kontribuas al la informa aktivado de UEA. Propaganda Konto krome subvencias Fondaĵon Canuto, ebligante 400 pliajn UEA-membrigojn de nepagipovuloj.

Aparte internacian etoson havis la Infana Kongreseto, ariganta 38 infanojn, el kiuj plimulto venis el Orienta Eŭropo kaj Meza Azio. La antaŭ-kongreson en Turku preparis la loka klubo. Partoprenis ĉ. 100 personoj.

Kiel tradicie, nia revuo dediĉis sian septembran numeron al la UK, kun kompletigoj en postaj numeroj. Amplekse raportis ankaŭ *Heroldo de Esperanto*.

Revuoj: Esperanto kun nova vizaĝo

ESPERANTO

La jaro komenciĝis per grafika renovigo de la revuo: la kovrilo kaj la rubrik-kapoj estis komplete refasonitaj. La rezulta plibeligo rikoltis laŭdajn reagojn, sed tiuj ankoraŭ ne transformiĝis en pliajn abonojn por la Esperantlingva revuo kun la plej granda eldonkvanto: 5046 en 1995 signifis nur 1 plian abonon kompare al 1994. Konstateblas daŭra akurateco de *Esperanto*: tra la jaro, ĝi estis forsendata en la komencaj tagoj de la koncerna monato. La anoncenspezoj, 9584 gld., restis kaj sub la buĝetita sumo (11 500) kaj sub la rezulto en 1994 (10 228 gld.).

Kvankam, por diversigi la enhavon, artikoloj malofte superis nunuŝan amplekson, la revuo publikigis esplorajn kaj analizajn materialojn pri tiel diversaj temoj kiel, interalie, Nobel-premiitoj kaj Esperanto (feb.); la sveda E-pioniro kaj homsavanto Valdemar Langlet (majo); sociologio de la E-movado (BK-gajninta eseo de N. Rašić, majo); la novaj ebloj por Esperanto en radiofonio kaj en komputilaj retoj (majo resp. dec.); la lingva situacio en EU-instancoj (jun.); 100-jariĝo de la verkisto Ferenc Szilágyi (jul.-aŭg.); la agado de Unesko (okt.); aŭ la situacio de TEJO (nov., dec.).

Ne mankis detalaj artikoloj pri gravaj E-eventoj — kiel la Tria Afrika aŭ la Dua Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso — kaj pri la movada aktualo en Albanio, Bharato, Brazilo, Bulgario, Kolombio, Koreio, Kroatio, Litovio, Pollando, Rusio kaj Slovakio. Vojaĝ-raportoj priskribis spertojn en Rusio, Latvio kaj Kroatio; Ganao kaj Ebura Bordo; Pakistano, Nepalo kaj Ĉinio; Centra Ameriko kaj Kolombio. Speciala sekcio (feb.) estis dediĉita al la kongreslando, Finnlando.

El la ne malmultaj intervjuoj menciindas i.a. tiuj kun Daniel Tarschys, ĝenerala sekretario de Konsilio de Eŭropo (jan.); lingvistino Maria Luisa Altieri Biagi (marto); tradukisto Fernando de Diego (apr.); Atilio Orellana Rojas, UEA-komisiito pri amerika agado (apr.); kaj la nova UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong (sept.).

La recenza rubriko pritraktis 48 librojn kaj aliajn eldonaĵojn sur pli ol 16 paĝoj. Ĝi daŭre postlumis la aperadon de novaĵoj: dum ĝi parolis pri titoloj 2-3 jarojn aĝaj, la najbara “Laste aperis” premiere prezentis 222 novaĵojn, el kiuj 104 aperis en 1995.

Nur 4 artikoloj pri ĝeneralaj temoj movadaj eniris la paĝojn de la debato “Forumo”; sed, kompanse, legantoj 52-foje esprimis opinion en “Reagoj”.

Pri la revuo mem skribis 4 el ili; pri politiko 3; pri movadaj demandoj 18; sed plej popularis lingvaj diskutoj (19, el kiuj 6 pri la preferinda nomo de Finnlando kaj Bharato, 4 pri la uzo de komoj, kaj 2 pri neologismoj).

KONTAKTO

La soci-kultura revuo *Kontakto* de TEJO, eldonata de UEA, aperis en 6 numeroj. Ĉiu numero havis ampleksan ĉefartikolon pri aktuala temo, i.a. *Mazi en Gondolando*, la 100-jariĝo de kino kaj radio, kaj la 50-jariĝo de UN. Aperis krome serio de rememoroj pri Andreo Cseh, lige kun la 100-a datreveno de lia naskiĝo. Parto de la enhavo de *Kontakto* estis verkita en facila lingvonivelo, ĉar la revuo celas servi, krom al junaj legantoj, ankaŭ al ĉiuaĝaj lernantoj de la lingvo. En ĉiu numero aperis konkurso.

Grafike *Kontakto* retenis altan nivelon, sed ankaŭ en 1995 ĝi ne sukcesis certigi regulan aperritmon. La nombro de pagitaj abonoj iom falis. Estis 445 simplaj kaj 542 kolektivaj abonoj (en 1994: 462 resp. 601). Krome ricevis ĝin 739 junaj individuaj membroj (702), 92 patronoj de TEJO (91) kaj 12 dumvivaj patronoj de TEJO (12). La nombro de pagitaj abonoj do estis 1830 (1868 en 1994).

Eksteraj rilatoj kaj informado: Plifirmigo de kontaktoj

(Respondeca estrarano: Fettes; poste Lee kaj Fettes pri eksteraj rilatoj, kaj Jegorovas pri informado; diversaj komisiitoj.)

Tra la jaro senteble vigliĝis la agado pri eksteraj rilatoj, nelaste pro la influo de la nova prezidanto, kiu taksas tiun kampon aparte grava (vidu ekz. lian novjaran mesaĝon, jan. 1996, p. 1). Por kapti ĉiujn ŝancojn, tamen, daŭre validas la alvoko el antaŭaj jaroj: necesas pli da aktivuloj, unuavice en strategie gravaj urboj kiel Novjorko, Parizo, Bruselo, Strasburgo, sed ankaŭ en plej diversaj aliaj lokoj tra la mondo. Sinproponoj estas ĉiam bonvenaj ĉe la respondecaj estraranoj kaj komisiitoj.

UN, UNESKO

En marto Fettes refreŝigis la rilatojn kun Unesko per persona vizito al la Pariza sidejo, por preparoli diversajn eblajn komunajn projektojn kun la Asista Ĝenerala Direktoro pri Edukado kaj ties kunlaborantoj (majo, p. 88). La kontaktojn plifirmigis dua vizito al la Eduka Sektoro en oktobro, kiam Lee, Fettes kaj Wandel ankaŭ renkontis reprezentantojn de neregistaraj organizoj (NRO) kunlaborantaj kun Unesko (vd. “Faka agado”, p. 114). Ĝis la jarfino rezultis i.a. la pretigo de subvencipeto sub la programo Linguapax. La komisiito ĉe Unesko, Barbara Despiney, eniris la organizan komitaton de NRO-kolokvo pri ekonomiaj rilatoj. UEA cetere devis, pro ŝanĝoj en la Unesko-regularo, abunde dokumenti sian agadon por certigi la daŭrigon de siaj konsultaj rilatoj.

En Novjorko, reprezentantoj Rochelle Grossman kaj Julius Manson regule partoprenis en diversaj gravaj kunsidoj de UN-organoj. Pro la 50-jariĝo de UN (temo de la 80-a UK), okazis diversaj kontaktoj kun la kunordiga sekretariato por la datreveno. Ankaŭ TEJO unuafoje aktive partoprenis en la agado ĉe UN, unue dum la Konferenco pri Socia Evoluo en Kopenhago, kie

Jimmy Stryhn Meyer estis ano de la organiza komitato por la Junulara Forumo, poste per vizitoj al Novjorko de usonanoj Daniel Cuthbert kaj Jozefo Truong. De tempo al tempo Humphrey Tonkin skribis al la diplomataj misioj en Novjorko por atentigi pri artikoloj en *Esperanto* kiuj tuŝis iliajn landojn. Ankaŭ la 13-a CED-konferenco (vd. “Lingvo”, p. 113) kontribuis al ĝenerale vigla profilo de UEA.

EŬROPO


Ĉar Eŭropa E-Unio plu konsideras sin sendependa tegmenta organizo por la ekstera agado en Eŭropo (vd. “Landa kaj Regiona Agado”, p. 110), UEA direktas sian atenton al senperaj kon-

ciindas ankaŭ la sendependa agado de Germain Pirlot, kiu per diligenta korespondado starigis liston de pli ol 70 eŭropaj parlamentanoj subtenantaj Esperanton. Foje helpa, foje malhelpa estas la agado de Transnacia Radikala Partio: ĝiaj strategio kaj taktikoj, kiuj emfazas konfrontiĝon kaj agresan lo-biaddon, sufiĉe malsimilas al tiuj de UEA, kiu preferas labori silente kaj diplomatie por gajni longdaŭran subtenon. El ĉio ĉi rezultis ĝis nun ioma plivigliĝo de la diskutoj pri Esperanto en eŭropaj politikaj medioj, sed ni restas longe for de la serioza esplorado kaj decidado kiu necesas por ĝia akcepto kiel tut-eŭropa dua lingvo. Ĝis aperos pli da kohero kaj komuna volo inter la landaj asocioj (ekzemple per la kreo de Komisiono por Eŭropa Kunlaboro kadre de UEA), estos malfacile organizi efikan kampanjon tiucele.

INFORMA FAKO

La jam tradiciiganta Ago-Tago denove fariĝis unu fokuso de la informa agado, kiel pruvis ampleksa, kvankam nekompleta aro da raportoj el 19 urboj en 10 landoj (dec., p. 201). Alian fokuson liveris la 80-a UK, kies gazetara servo (gvidata de la sperta ĵurnalisto Kalle Kniivilä) estis la plej profesinivela en la lastaj jaroj. Ĝi abunde provizis komunikilojn per novaĵoj pri la kongreso kaj Esperanto ĝenerale, i.a. per ĉiutagaj gazetaraj konferencoj kun malsamaj, antaŭe anoncitaj ĉeftemoj — ripetinda sperto. En la finna gazetaro aperis ĉ. 200 novaĵoj, artikoloj k.s. Bona unupaĝa raporto dissendita de la informagentejo Reuters aperis en multaj ĵurnaloj kaj kondukis al propra raporto de la televida kompanio CNN.

Fine de la jaro komenciĝis preparoj por la relanĉo de la bulteno *Influo* kiel rubriko en *Esperanto*, sub la redaktado de Geoffrey Greatrex.



Vizitoj de la tri estraranoj Lee, Wandel, Fettes (de supre maldekstre, laŭ horloĝdirekto) al la Pariza sidejo de Unesko servis por esplori novajn eblojn de kunlaboro.

taktoj kun politikaj instancoj en Bruselo kaj kun Konsilio de Eŭropo en Strasburgo, ĉe kiu ĝi tenas konsultajn rilatojn. En ambaŭ lokoj ĉefrolas Hans Erasmus: liaj cirkuleroj pri la “Laborgrupo pri la lingvoproblemo en EU” — kies kostojn pagas UEA — fariĝis la ĉefa komunikilo sur tiu kampo. Men-

Landa kaj regiona agado: Veteris malsame, laŭ

Pri ĉi tiu tre varia agadkampo engaĝis sin dum la jaro ne malpli ol kvin estraranoj kaj deko da komisiitoj kaj komisionanoj, por ne paroli pri multaj volontuloj sen titolo sed kun entuziasmo kaj laboremo. Konstruante sur diversaj pervaĵaj kontaktoj (flegitaj precipe de Ulrich Lins kaj So Gilsu), Triolle inaŭguris la novan mandaton per cirkulero al landaj asocioj (LA) por informiĝi pri iliaj atingoj kaj planoj, sed ankaŭ problemoj kaj misatingoj. Reagis 4 LA el Ameriko, 3 el Afriko, 8 el Eŭropo: rikolto malgranda, sed kun fasko da valoraj ideoj kaj spertoj, kiu pravigas prioritatigon de plua disvolvo de tiaj interŝanĝoj.

AFRIKO

(Respondecaj estraranoj: Bakker, poste Triolle. Komisiito: Bakker.)

Afriko restas la kontinento kies esperantistaro plej multe dependas de kontaktoj kun la tutmonda movado. Ne temas (nur) pri monhelpo, sed pri korespondado, ĝemeligo de kluboj, sendado de legaĵoj, kaj (maloftaj) vizitoj. La movado floras tropike-abunde kie tiaj kontaktoj estas densaj, kaj sekiĝas kiel dezerto kie ĝi estas izolita. Ekzemploj de la unua speco estas Togolando, Niĝerio, Tanzanio, Madagaskaro kaj laste Zimbabvo. La afrikan movadon multe influas ankaŭ faktoroj kiel milito, subpremado kaj malriĉeco, unuflanke, kaj elstaraj gvidantoj, aliflanke. Ĝemelado plu funkciis inter kluboj kaj asocioj. La korespondado kun Afriko tamen ne estas sufiĉe amasa. Ankaŭ prokongresaj vizitoj malmultis: en la Tria Afrika Kongreso (Ganao) kaj la Kvara (Tanzanio), kiuj okazis komence resp. fine de 1995 (vd. marto, p. 41, resp. '96 feb., p. 21), partoprenis multaj afrikanoj, sed nur manpleno el aliaj kontinentoj. Trista kulmino estis la malpermeso al kvin afrikanoj veni al la UK en Finnlando, pro vizaj ĉikanoj.

(Ad)mirindas en tiaj nefavoraj cirkonstancoj la kuraĝo de vasta tavolo de afrikaj esperantistoj, kiuj fidelas kaj aktivas malgraŭ ĉio. Kvalite kaj kvante la situacio estas stabila. Kaj tie kie post seka periodo falas denove bona pluvo, tuj revenas aktiveco.

AMERIKO

(Respondecaj estraranoj: Lins, poste Triolle. Komisiito: A. Orellana Rojas. 5-membra komisiono.)

La komisiito aktive interrilatis kun landaj asocioj, helpante ankaŭ esperantistojn en landoj sen organizita

i.a. kadre de la lingvofoiro Expolingua kaj per seminario pri scienca kaj teknika aplikado de Esperanto. Ĉe ELNA en Usono aperis ampleksa angla-Esperanta vortaro de P.J. Benson.

AZIO

(Respondecaj estraranoj: So, poste Jegorovas. 5-membra komisiono.)

Post 6-jara mandato prof. So ne plu kandidatiĝis por la Estraro. Lian kunordigan laboron daŭrigis Komisiono pri Azia E-Movado. La bulteno *Esperanto en Azio* plu estis ligilo de aziaj aktivuloj. Aperis ankaŭ la unua eldono



movado. En Tampere la komisiono funkciigis informbudon, i.a. vendante varojn favore al Fondaĵo Ameriko. La kapitalo de tiu fondaĵo kreskis de 21 898 gld. al 26 643 gld., sed ĝi plu estas tro malgranda por produkti renton kiu ebligus senteble subteni la latin-amerikan movadon. En 1995 la subteno (ĉefe librosendoj) estis nur 358 gld.

La julia kongreso de Brazila E-Ligo kun 475 partoprenantoj estis la plej granda aranĝo de 1995 post la UK. Por pli efike organizi la movadon en tiu vasta lando, BEL survojas al nova, federacia strukturo. La argentina movado reunuiĝis post 6-jara skismo: la du landaj asocioj kuniĝis sub la nomo Argentina E-Ligo. Malgraŭ malfacilaj kondiĉoj Kuba E-Asocio vige aktivis,

de *Gvidlibro pri Esperanto-Movado en Azio*, kun informoj pri ĉiuj landoj kie estas esperantistoj, kaj kun ampleksa adresaro.

La agado de Korea E-Asocio estis distingita per Trofeo Fyne. Pro perdo de registara subvencio por la revuo *La Espero el Koreio* KEA devis ĝin malfondi, sed anstataŭe la asocio transformis sian internan organon, *La Lanterno Azia*, en monatan revuon. Kune kun la Koreaj Lingva Societo kaj Fonetika Asocio, KEA organizis sukcesan simpozion pri lingvopolitiko (jul.-aŭg., p. 127).

Internacia Himalaja Renkontiĝo (jun., p. 104) de Nepala E-Asocio allogis 14 eksterlandanojn el 7 landoj. Novan formon de kunlaboro iniciatis japanoj kaj koreoj per eldono de libro

la klimato

pri la problema komuna historio de la du landoj.

En Filipinoj fondiĝis Esperanto-asocio. Vjetnama Pacdefenda E-ista Asocio alinomiĝis al Vjetnama E-ista Asocio. Ĝi celas aliĝi al UEA kaj fariĝi vera movada organizaĵo, dum VPEA ĉefe estis kanalo de ŝtata informado al eksterlando.

EŬROPO

(Respondecaj estraranoj: Lins, poste Triolle por Okcidenta kaj Jegorovas por Orienta Eŭropo.)

La Dua Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso okazis junie en Parizo kun ĉ. 450 partoprenantoj el 24 landoj (jul.-aŭg., p. 126). Ĝi rolis kiel oficiala kongreso de la LA el Britio, Francio, Germanio kaj Italio, kaj enprogramiĝis ankaŭ laborkunvenoj de aliaj LA. Tamen, malgraŭ rezolucio pri la kongresa temo “Komuna lingvopolitiko por multkultura Eŭropo”, la kongreso funkciis precipe kiel kultura-turisma aranĝo, kiu apenaŭ kontribuis al la kunordigo de la agado de EU-landaj asocioj.

Tian kunordigon celas Eŭropa E-Unio, kiu en 1995 liberiĝis de la ŝuldoj kiuj praktike malebligis ĝian agadon

dum multaj jaroj. Sed la situacion malklarigas la multeco de iniciatoj sur la eŭropa kampo — krom EEU, ekzistas Eŭropa Klubo (faka asocio kunlaboranta kun UEA), Agadkomitato por Federacia Eŭropa Lingvopolitiko (AFEL), kiu estas komuna laborgrupo de UEA, EEU kaj ILEI pri la lingvoproblemo en EU, kaj agadoj de unuopuloj, plej notinde tiu de Germain Pirlot por informi eŭro-parlamentanojn. AFEL celis krei klarecon sur tiu kampo, tamen sen sukceso. Necesis distingi inter movada kunlaboro de landaj asocioj (ekz. la sukcesa agado ĉe radiostacioj, kiu rezultigis ke Vieno ne mutiĝis kaj Varsovio pli bone kapteblas per satelito), kunlaboro pri la lingvoproblemo en eŭropaj instancoj (ekz-e la distribuado de la Pariza rezolucio ĉe la renkontiĝo de la 15 ŝtatestroj en Cannes, fare de esperantistoj el Francio, Italio kaj Hispanio/Katalunio), kaj agado por eŭropa unueco. Tiun lastan la landaj asocioj ne povas partopreni pro ĝia politika ne-neŭtraleco.

En Orienta Eŭropo daŭris la organiza marasmo de pluraj landaj asocioj, kvankam sur loka nivelo videblis revigliĝo. Ĉeĥa E-Asocio, malgraŭ komencaj malfacilaĵoj, sciis iom post iom mobilizi siajn membrojn por prepari la 81-an UK. Kroatia E-Ligo re-

vivigis sian organon *Tempo* kaj altiris atenton de ekstera publiko al prezentoj de novaj E-libroj. Litova E-Asocio okazigis, kun 202 partoprenantoj, la 31-ajn Baltiajn E-Tagojn. En Rusio elstaris la eldona aktiveco — precipe ĉe Sezonoj en Jekaterinburgo —, sed organize la reunuiĝinta landa asocio estas ege malforta: nur 17% el la membroj de la antaŭaj asocioj aliĝis al ĝi. Post sufiĉa solidiĝo de Rumana E-Asocio, UEA akceptis ĝian aliĝon. Restas por vidi ĉu simile fortiĝos Albana E-Ligo, kiu ŝanĝis estraron en 1995.

Por subteni sian landan asocion en Bosnio-Hercegovino, UEA aranĝis vendokampanjon de ĝiaj eldonaĵoj, helpis distribui kasedojn kun E-elsendoj de Radio Sarajevo kaj invitis Sarajevan aktivulon al la UK. Kataluna E-Asocio ekpretigis vastan agadon por helpi al la bosnia asocio (apr. '96, p. 67).

OCEANIO

(Respondecaj estraranoj: Lins, poste Jegorovas.)

En Aŭstralio la agado ĉiam pli koncentriĝis al la preparoj por la 82-a UK en 1997. La LKK produktis Esperantan dublaĵon de filmo pri Adelajdo, kaj bela prospekto estis distribuata jam en la Tamperea UK.

Junularo: Ĉiu kontribuo bonvenas

(Respondeca estrarano ekde UK: Lipari. Por pliaj detaloj vidu la jarraporton de TEJO, *TEJO Tutmonde* 2/1996.)



Ĉu subfosantoj?
Jes, en junulara laborkampo
somera (Blera, Italio).

El multaj vidpunktoj, krom eble nur la financa, 1995 estis bona jaro ankaŭ por TEJO, la junulara sekcio de UEA. Ŝanĝiĝis la okkapa estrara teamo, en kiu ses novaj aktivuloj nun kontribuas per siaj ideoj. Firmiĝis jamaj agadprojektoj, dum aperis multaj planoj por novaj. Ankaŭ ekster la estraro la nombro de aktivaj kunlaborantoj kreskis. Same altiĝis la rekono kaj subteno por la laboro de TEJO. Tion atestas ekz. la kreskanta nombro de patronoj kaj la grandiganta intereso pri TEJO en ne-esperantistaj internaciaj rondo.

Sur eŭropa nivelo, la rilatoj de TEJO kun aliaj junularaj organizaĵoj daŭris bonaj. Aldone al la membreco en Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizaĵoj (EKB), TEJO sukcesis iĝi membro de Junulara Forumo de Eŭropa Unio (JF). Multtalenta teamo de gejunuloj sukcese traktas tiujn kontaktojn, kiuj

gravas por informoj pri plej diversaj aferoj kaj por eblaj estontaj monfontoj. Ankaŭ ekster Eŭropo TEJO pli kaj pli aktivas, kvankam tie ankoraŭ mankas strukturo kiel la eŭropa.

La rondoj en kiuj landaj sekcioj (LS) de TEJO kunlaboras inter si ("ĉeloj") regule funkciis kaj plimultiĝis. Post la unua iniciato mezeŭropa, MEJK, ekstis similaj ĉeloj en Okcidenta Eŭropo, Iberio, Balkanio kaj la Alp-Adria regiono. En Azio la kunlaboro inter japanaj, koreaj kaj ĉinaj gejunuloj firmiĝis per Komuna Seminario en Ĉinio. La "dorsosaka projekto", kiu provizis per informmaterialoj plurajn LS de TEJO, estis finita. En ĝia kadro la flugfolio *Esperanto, kio estas tio?* estis tradukita al (kaj nun havebla en) pli ol tridek lingvoj.

En aprilo TEJO transprenis de Germana E-Junularo la oficejon en Bonn. Tiu oficejo (BonEJO) celas plenumi laborojn por TEJO kiuj ne apartenas al la taskaro de la CO, kaj laŭeble ankaŭ oferti servojn al aliaj organizaĵoj. Bedaŭrinde TEJO ne sukcesis ricevi subvencion por BonEJO en 1995, tiel ke ĝiaj spezoj premas sur la spezokonto per ne-planitaj ĉ. 13 000 gld. Alia subvencio, kiun TEJO ricevis en pasintaj jaroj, estis maltrafita pro miskomprenita administra regulo. Pro tio deficito de ĉ. 30 000 gld. forprenis plejparton de la Junulara Fondaĵo. Temas tamen pri unufoja afero; la financa bazo de TEJO ja malboniĝis, sed ne atendendas pliaj drastaj malkreskoj.

Estis ankaŭ pozitivaj financaj mesaĝoj. Eŭroka lanĉis la unuan volumon de la kompakta disko *Vinilkosmo-kompil'* kaj ricevis tra TEJO subvencion por parte financi la duan. Fondaĵo Partopreno IJK subvenciis dekkvinon da gejunuloj por viziti la Internacian Junularan Kongreson apud Sankt-Peterburgo. Okazis sukcesa TEJO/KER-seminario en la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto (jun., p. 106) laŭ favoraj kondiĉoj de EJC, tiel ke TEJO mem devis kontribui per nenio krom laborforto. Realigis sukcesa trejnseminario en Kroatio, por kiu oni kolektis apartajn subvenciojn.

La kreskanta agado de TEJO daŭre postulas pli da financaj rimedoj. La estraro serĉas novajn eblojn por subvencii siajn projektojn. Samtempe necesas altigi la enspezojn el kotizoj de membroj kaj patronoj. Ĉiu kontribuo bonvenas kaj estas aprezata!

Instruado: La jaro de Mazi

(Respondeca estrarano ekde UK: Triolle.)

Dum multaj jaroj neniu estrarano estis taskita pri instruado. Tio ŝajnis necesa, precipe post la akcepto de kontrakto per kiu en 1990 UEA komisiis "la plenumon de sia internacia eduka agado" al ILEI. Tamen, la manko de respondeca estrarano tro dis-

konstati ankaŭ ke la kandidatoj donas pli da atento al la gramatika parto ol al movadaj kaj literaturaj konoj.

Por la tria fojo okazis la sudamerika Interlanda Konferenco pri Instruado, ĉi-foje en Brazilo, kie ankaŭ malfermiĝis tri universitataj kursoj pri



Foto: Walter Kling jun.

Studinta en la Budapeŝta E-fako, Katalin Smidélus (Hungario) Cseh-instruis ankaŭ en Viena gimnazio, en oktobro.

tancigis UEA disde la instrua kampo kaj kaŭzis neglataĵojn en la informfluo inter UEA kaj ILEI. En la nova Estraro instruado revenis kiel fako, kio jam montriĝis tre utila.

ILEI havis ĉ. 800 membrojn kaj 36 landajn sekciojn. Tuj post la UK okazis en Övik ĝia 29-a konferenco, kun 62 partoprenantoj el 26 landoj. Lige kun ĝi 7 gelernantoj el 5 landoj partoprenis la 3-an ILEI-Gimnazion. *Internacia Pedagogia Revuo* aperis regule sub la nova redaktoro József Németh. ILEI eldonis *Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj* de Jon Rømmesmo, sed cetere ĝi plu suferis mankon de financaj rimedoj, pro kio ekz. neniu instruista trejnseminario povis okazi.

Realigis 11 sesioj de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI. El 71 kandidatoj de la elementa kaj 37 de la meza ekzameno sukcesis 54 resp. 25. Pli ol duono el ĉiuj ekzameniĝis en Chengde (Ĉinio). Ĉiam pli forte oni sentas la mankon de ekzamena gvidlibro. Eblas

Esperanto. Dum en Eŭropo Universitato ELTE en Budapeŝto reduktis la E-fakon de du instruistoj al unu, kaj fermiĝis la universitata kurso en Aix-en-Provence (Francio), aliflanke en Italio komenciĝis tre populara kurso por instruistoj en la Tria Roma Universitato (maj., p. 85) kaj malfermiĝis studfako pri interlingvistiko en Torino.

Tamen, la plej granda evento estis la apero de la vidbenda E-kurso, *Mazi en Gondolando*, lanĉita en Tampere. La projekton realigis Internacia E-Instituto, kiu ĝis la fino de la jaro vendis 1374 kurskompletojn. Komenciĝis preparoj por adapti la kurson por televida uzo.

Koresponda Servo Mondskala, unu el la plej malnovaj servoj de UEA, ricevis 362 petojn en 1994; 692 en 1990). La malkresko okazis parte pro apero de aliaj similaj servoj, sed ĉefe tamen pro nesufiĉa diskonigo de KSM en la eldonaĵoj de UEA, TEJO k.a. asocioj.

Kulturo: Pli granda kaj varia libromerkato

(Respondeca estrarano: Lipari.)

Ne estas tasko de jarraporto doni kompletan panoramon pri la vasta kaj apenaŭ supervidebla rikolto de la Esperanta kulturo en 1995. Ĉi-sube ni mencias nur kelkajn atingojn, parte iel ligitajn al la agado de UEA.

EVENTOJ KAJ PREMIOJ

La kultura programo de la Universala Kongreso estis aparte riĉa en 1995, de finna segil-muziko kaj la rok-grupo Persone ĝis la monodramoj de Jadwiga Giebczyńska aŭ la Esperanto-teatro el Sankt-Peterburgo (sept., p. 152-155). En la programero "Libro de la jaro", kiu fariĝas iaspeca inform-borso, prezentiĝis dekoj da titoloj, el kiuj pluraj (*Asteriks kaj Kleopatra*, *La kumularo de l' Ringo*, *Nesto de viperoj*, *Komputika leksikono*) furoris poste tra la jaro.

Belartaj Konkursoj, post magra jaro en 1994 (57 verkoj senditaj), povis registri en 1995 duoble pli altan kvanton de 120 konkursaĵoj. Kvanto naskis kvaliton proporcie: la altan nivelon rekompencis entute 24 premioj kaj honoraj mencioj (13 en 1994). Malsame al antaŭaj jaroj, kiam nur la branĉoj proza kaj poezia gardis senŝanĝan popularecon, en 1995 regis granda

konkurenco ankaŭ inter eseoj, kantoj kaj vidbendoj. Unuafoje en la historio de BK, oni povis gravuri la nomon de ĉina Nova Talento, MAO Zifu, sur la pokalon Harabagiu.

La Premion Deguĉi ricevis unu el la plej multflankaj kaj inspir-donaj



La kultura oferto Esperanta inkluzivas pli kaj pli da ne-libraj eroj. Jen instrua disko komputila.

formantoj de la Esperanta kulturo, William Auld (okt., p. 161). FAME-Fondaĵo distingis per sia 5-a Esperanta Kulturpremio la brazilan eldoniston Gersi Alfredo Bays, kies eldonejo Fonto publikigis jam pli ol 60 librojn kaj preskaŭ 200 numerojn de la samnoma revuo. La societo OSIEK

aljuĝis sian premion al Donald Broadribb, pro lia traduko de la Platona *La Respubliko* (recenzo: apr., p. 72).

ELDONADO

La pasintjara eldona agado de UEA limiĝis al kelkaj broŝuroj (vd. "Administrado", p. 107). Mezurite laŭ la kvanto de novaj titoloj, pli signife agadis la eldonejoj KAVA-PECH (Ĉeĥio), Pro Esperanto (Aŭstrio) kaj Flandra E-Ligo.

Dum prepariĝis grandegaj vortaroj hungara-, itala- kaj hispana-Esperanta, nia leksikografio jam en 1995 riĉiĝis per grandaj aŭ mezgrandaj vortaroj angla-Esperanta, Esperanta-rumana kaj Esperanta-ĉeĥa, nova eldono de la dudirekta germana vortaro de E-D. Krause, dudirekta frisa vortaro kaj *Parolturnaro germana-Esperanta*.

Post iometa refalo en la lastaj jaroj, la Esperanta libromerkato ŝajnas denove kreski. Laŭ la rubriko "Laste aperis", en 1995 UEA ofertis kiel novaĵojn jam 201 presaĵojn kaj 21 aliajn varojn (138 + 11 en 1993, 189 + 16 en 1994). Rimarkindas la pli kaj pli larĝa gamo de vidbendoj kaj kompaktaj diskoj, plej ĵuse eĉ de komputila nurlega KD (recenzo: majo '96, p. 93).

Lingvo, esploro kaj dokumentado: Survoje al lingvopolitiko

(Respondecaj estraranoj: Wells, poste Wandel, pri lingvaj aferoj; Fettes, pri CED.)

La diskuto pri lingvopolitiko, lanĉita siatempe de Ian Jackson, konkretiĝis en la 80-a UK per komitata labor-grupo kaj la starigo de komisiono (vd. "Ĝeneralaĵoj", p. 106). La gvidanto de la komisiono, Detlev Blanke, poste resumis la ĉefajn ideojn malantaŭ tiu iniciato (majo '96, p. 89). Kun simila celo, Wandel eklaboris por plibonigi la komunikadon inter UEA kaj la Akademio sub ties nova prezidanto Werner Bormann (feb. '96, p. 30).

La 5-an de majo okazis la 13-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, organizita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) kunlabore kun la Fakoj pri Konferencaj Servoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj (Novjorko). Kvindek da partoprenantoj

traktis la datrevenon de la lingvaj servoj de UN sub la temo "Lingvoj en internaciaj organizoj: Ĉu duonjarcento da ordo inter nacioj?" Nurajn tri semajnojn poste, CED rolis en alia konferenco dediĉita al UN, organizita de la Kanada Centro por Lingvaj Rajtoj (Otavo): Humphrey Tonkin, Mark Fettes kaj Claude Piron faris tri el la sep plenkunsidaj referaĵoj en tritaga programo pri la temo "Estonteca rigardo al lingvopolitiko por UN" (jul.-aŭg., p. 127).

Por fermi tiun serion de konferencoj inspiritaj de la datreveno de UN, la 18-a Esperantologia Konferenco dum la UK traktis la temon "lingvopolitiko" en aparte ampleksa formo, kun kvin horoj da referaĵoj kaj dis-

kutoj: unue pri la lingvopolitiko de internaciaj organizoj kaj institucioj, poste pri la kialoj de tio ke Esperanto ne akceptiĝis tie, kaj laste pri la lingvopolitiko de la Esperanto-komunumo mem (sept., p. 148).

La esperantlingva serio de "Esperanto-Dokumentoj" pliriĉiĝis per *Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo* de A. Chiti-Batelli. En la anglalingva serio presiĝis la unua kajero sub prizorgo de la usona landa asocio ELNA, *Esperanto Studies: An Overview* de Tonkin kaj Fettes. Per volontula helpo daŭris la listigado de periodaĵoj en Biblioteko Hodler, sed por pli fundaj laboroj (precipe komputila katalogado de la tuta kolekto) UEA ankoraŭ ne trovis rimedojn.

Faka agado / Scienca aplikado: Kunlaboremo kreas novajn ligojn

(Respondeca estrarano ekde la UK: Wandel.)

Responde al insista peto de kelkaj fakaj asocioj (FA), faka agado revenis kiel estrarana laborkampo. Por eksondi pri la ebloj kontaktigi FA kun la respektivaj internaciaj organizoj, estraranoj renkontis en Parizo (dec., p. 207) reprezentantojn de pluraj el ĉi tiuj. Rezulte, Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj establis senperan kontakton kun Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

La estrarano cirkuleris al la FA, proponante al ili novajn servojn, ekz. helpe al membrovarbado kaj diskonigo de ilia agado dum la UK kaj pere de *Esperanto*. La revuo, krom oftaj raportoj kaj novaĵoj pri la agado de FA, vaste artikolis pri du el ili: Internacia Fervojista E-Federacio (jan., p. 12) kaj Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (dec., p. 206).

UEA subskribis kunlaboran kontrakton kun Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj (OSIEK), sed prokrastis ĝis Prago similan peton de Amikaro Bruno Gröning. Pro plurjara lamado la artista FA rezignis pri la statuso de aliĝinta FA. Du novaj asocioj prezentis sin en Tampere: Rondo Kato, kiu rapide arigis grandan membraron, kaj Amikaro de Esperanto en Radio (AERA), funkcia kadre de OSIEK, kiu regule aperigas informojn pri E-radioelsendoj kaj konsilojn por aŭskultado, i.a. en *Esperanto* kaj *Kontakto*. Kun subteno de UEA okazis en Tampere kunsido por prepari la fondon de FA de socialaj laborantoj.

Ankaŭ en 1995 la plej grandaj fakaj konferencoj estis tiuj de instruistoj (ILEL, okt., p. 169), fervojistoj (IFEFF), katolikoj (IKUE) kaj blinduloj (LIBE). Fervojistoj konferencis en Pécs (Hungario), kun 327 partoprenantoj (okt., p. 170), katolikoj en Olomouc (Ĉeĥio), kun 177 kongresanoj (okt., p. 170), kaj blinduloj en Tuusula (Finnlando), kun 77 kunvenantoj (nov., p. 188). Al la ekumena konferenco en Kaunas (Litovio) ariĝis 90 kredantoj. Ĉiuj ĉi aranĝoj relative bone altiris la atenton de ekstermovadaj medioj fakaj aŭ lokaj.

Movadhistorie grava estas la krizo de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĝia kongreso en Maribor (Slovenio) ko-

lektis nur 120 sennaciulojn. Kun mal-kreskanta kaj maljuniĝanta membraro kaj premaj financaj problemoj, SAT devus redifini sian identecon por adaptiĝi al cirkonstancoj radikale malsamaj ol kiam ĝi ankoraŭ rivalis kun UEA. Readaptiĝon bezonas ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado, kunlaboranta kun UEA, kiu ĉesis eldoni la revuon *Paco*.

Sur la scienca kampo la plej grava evento estis la unuafoja okazigo de du ok-horaj kursoj de AIS kadre de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) dum la UK. Unu kurso temis pri astronomio-astrofiziko, la alia pri komputiko. AIS kaj UEA lanĉis komunan alvokon (feb. '96, p. 28) kaj decidis daŭrigi la kunlaboron, i.a. per dua komuna AIS/IKU-sesio en Prago.

Inter la fakaj libroj imponis la 2-voluma, 900-paĝa *Roma Meslibro*, eldonita en Vatikano. La plej grava nova terminaro estis *Komputika leksikono* de Sergej Pokrovskij (eld. Sezonoj). Terminologia E-Centro de UEA aperigis *Zoologia kaj botanika nomenklaturaj: Propono pri regularoj*. Gravaj originalaj verkoj estis *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio* de Nikola Rašić (Edistudio); *Sanon!*, naturkuraca konsilaro de Jaime Scolnik (MZ); *Klopodu kompreni min!*, konsiloj por gepatroj de aŭdodifektitaj infanoj, de Aira Kankkunen (MZ), kaj la monografio *Lirikaj perloj de Al-Andalus* de Antonio Marco Botella (Fundación Esperanto). Surmerkatigis kaj popularigis la Esperanta tekstprilabora programo Ĉapelilo de Simono Pejno.

Fervojistoj tradicie apartenas al la plej aktivaj fakaj aplikantoj de Esperanto, kaj iliaj kongresoj estas inter la plej vizitataj.



Foto: Karen Olsen

Finaj vortoj: Cedi al nova optimismo

En 1995 ne mankis perdoj, faloj kaj batoj. Tamen, kun membrara kresko, vigliginta libromarkato, impona Universala Kongreso, unua profesia vidbenda kurso kaj nekutime tutmonda nova Estraro de UEA, la inventaro de la jaro saldiĝas pozitive. Pesimismo, kiu sekvis el hastaj konkludoj pro tempe aŭ geografie limigita rigardo al la movado, cedas al nova optimismo, kiu vidas la evoluon de la Esperanto-movado kaj de ĝia ĉefa reprezentanto, UEA, en pli vasta perspektivo. Tiu optimismo ne lasas dikti la estontecon de ekstere, sed mem kreas ĝin.

Spezokonto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1995

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.)

KOSTOJ

Rezulto 1994		Buĝeto 1995	Rezulto 1995
461225	Salajroj	466000	477628
87596	Socia asekuro	91000	97927
20927	Suplementoj	21125	19465
1486	Kafo, teo, lakto	1400	1899
5000	Pensiaranĝo	0	7000
576234	Salajroj ktp, nete	579525	603919
16569	Afranko, nete	12050	18896
6213	Telekomunikiloj	6000	5750
6478	Presajoj	6000	8250
5268	Materialoj	8400	8169
8229	Maŝinoj, riparo/prizorgo	4250	6818
1500	Revizoro	1500	1500
1655	Administrataj kostoj	500	591
5982	Kopiado	6400	6949
-4067	Kopiado (vendoj)	-3600	-5741
47827	Centra Oficejo, nete	41500	51182
11601	Gasoj, elektro	10000	10093
692	Akvo	500	515
739	Riparo de la Domo	1500	1361
8017	Purigado	8000	7912
6015	Asekuro	6000	6036
2022	Impostoj je la Domo	3500	2443
-2555	Luo ricevita	-2000	-1712
26531	Oficeja Domo, nete	27500	26648
35970	Preskostoj <i>Esperanto</i>	38250	36278
47547	Afranko/ekspedo	52650	48298
21992	Grafiko	23850	23660
5090	Kovertoj	5250	4404
-10228	Anoncoj	-11500	-9584
100371	<i>Esperanto</i>, nete	108500	103056

19200	Preskostoj Jarlibro	21300	20607
16347	Afranko/ekspedo	16600	18551
6041	Grafiko	6500	4867
1382	Kovertoj	1800	1281
-14379	Anoncoj	-13800	-16060
28591	Jarlibro, nete	32400	29246

12771	Preskostoj <i>Kontakto</i>	12000	12841
7151	Afranko/ekspedo	7100	7336
615	Kovertoj	600	645
8500	Grafiko	10100	8825
12500	Redakto	12750	12750
-403	Anoncoj	-550	-606
41134	<i>Kontakto</i>, nete	42000	41791


8389	Estraro (vojaĝado)	9750	15261
1853	Estraro (korespondado)	3900	1813
1852	Oficistoj (vojaĝado)	3200	4461
12060	Vojaĝado (UK)	4350	3662
24154	Vojaĝoj/korespondado	21200	25197

3000	Edukado	3000	3000
762	Informado	3500	1333
0	Eksteraj rilatoj	1000	3215
1701	Komisiitoj, vojaĝoj	850	379
189	Komisiitoj, korespondado	750	576
5652	Movada evoluigo	9100	8503


2900	Bankokostoj	2500	3190
1040	Kurzodiferencoj	0	-3648
2746	Reprezentado	2500	6694
-3514	Antaŭaj jaroj	0	-4063
13	Diversaj kostoj	500	156
3185	Ĝeneralaj kostoj	5500	2329

6171	Amortizo, domo	6050	6881
6359	Amortizo, aparatoj/mebloj	4125	6355
2537	Amortizo, telefonsistemo	1575	1406
19618	Amortizo, komputiloj	10700	13186
12462	Amortizo, programaro	10400	9421
47147	Amortizo entute	32850	37249

900826	Sumo de la kostoj	900075	929120
---------------	--------------------------------	---------------	---------------



KOSTOJ DE UEA EN 1995



RIMEDOJ DE UEA EN 1995

RIMEDOJ

5696	Membroj Gvidlibro	5500	5492
42957	Membroj Jarlibro	43300	45390
262802	Membroj-Abonantoj	266700	261033
43178	Dumvivaj Membroj	44000	46754
10737	Membroj Jarlibro (junaj)	11950	11018
20465	Membroj-Abonantoj (junaj) ...	21050	19801
385835	Kotizoj de individuaj membroj	392500	389488
18553	Aligitaj membroj	19100	17733
4398	Aligitaj membroj junaj	4950	3708
9073	Abonoj <i>Esperanto</i>	10125	8526
1412	Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i> ...	1500	1250
15471	Abonoj <i>Kontakto</i>	14500	14907
7466	Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i> ..	5200	6848
27957	Societo Zamenhof	27200	48751
5795	Fakaj Organizoj	5150	5626
-6930	pago al TEJO	-7575	-6588
469030	Kotizoj	472650	490249
248441	Vendoj de la Libroservo	275000	255476
-150607	Kosto de varoj venditaj	-178750	-159841
97834	Libroservo, malnete	96250	95635
-5000	Katalogokostoj	-5000	-5000
0	al stokrezervo	0	-2124
4369	Abonfako	8000	6083
97203	Libroservo, nete	99250	94594
33998	Vendoj de Eldona Fako	41000	25608
-7179	Aldonoj (novaj libroj)	0	-5046
-15131	Ŝanĝo stokvalora	-24600	-13311
0	al stokrezervo	0	-4172
-1854	Tantiemoj	-2500	-1228
9834	Eldona Fako, nete	13900	1851
51512	Grafikaj servoj CO	56800	49149
20461	Aliaj servoj CO	28000	19165
5000	Kompenso - programado	5000	0
1500	Institucio Hodler	1500	1500
25000	Kompenso Propaganda Konto	30500	30500
103473	Servoj kaj Kompensoj	121800	100314
100765	Kotizoprocentaĵo 80-a UK	110000	147976
52277	Turismo	15000	28332
11741	Rento, nete	21000	28660
15373	Donacoj al la Ĝenerala Kaso .	14000	5676
3893	Aliaj enspezoj	2000	1749
184049	Diversaj enspezoj entute	162000	212393
863589	Sumo de la rimedoj	869600	899401
37237	Negativa saldo	30475	29719
900826	Sumo de la kostoj	900075	929120

Bilanco


de Universala Esperanto-Asocio je la 31-a de decembro 1995

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1994)

AKTIVOJ	1994	1995
Domo, Roterdamo	302353	337180
Tereno Aspremont	1	1
Nemoveblaĵoj	302354	337181

Ekipaĵoj & mebloj	27257	23173
Komputilaj aparatoj	38779	28707
Programaro	37387	28262
Telefonsistemo	5625	4219
en Novjorko	1	1
Maŝinaro ktp	109049	84362
Blokitaĵoj monrimedoj	3683	4097
Akcioj	904096	1034980
Obligacioj	215640	402340
Valorpaperoj entute	1119736	1437320
Stokoj libroservaj	204564	212396
Stokoj, Eldona Fako	430524	417213
Stokrezervo	0	-26296
Presajoj, materialoj k.s.	24871	18726
Provizoj entute	659959	622039
Ricevotaj rimedoj	131078	136592
Antaŭpagitaj kostoj	13255	12921
Debitoroj	191040	239153
Debitoroj ktp entute	335373	388666
Ŝparkontoj kaj deponoj	1714115	1736539
Kurantaj bankokontoj	175590	157184
Kasoj diversaj	7119	7571
Kasoj/bankokontoj entute	1896824	1901294
Sumo de la aktivoj	4426978	4774959
PASIVOJ		
Kapitalo	349149	334525
Saldo de spezkonto	-37237	-29719
Kapitalo Azio	473649	524178
Kapitalo, Ĝenerala & Azio	785561	828984
Kapitalo Dumvivaj Membroj	669879	765584
Rezervo, debitoraro	18936	19584
Kongresa Rezervo	75615	93434
Rezervo IJK	25000	25000
Rezervo, emeritaj oficistoj	61150	71987
Aliaj sumoj rezervitaj	70882	66133
Rezervoj entute	251583	276138
Belarta Fondaĵo	129867	130775
Fondaĵo Afriko	44	2
Fondaĵo Ameriko	21898	26643
Fondaĵo Azio	-864	-9796
Fondaĵo Biblioteko	20704	20391
Fondaĵo Canuto	-531	-3085
Fondaĵo Grabowski	48961	48669
Fondaĵo Junularo	34747	801
Fondaĵo Saliko	72251	70884
Fondaĵo Wüster	7169	3418
Konto Espero	23784	14404
Propaganda Konto	34287	69363
Triamonda Kongresa Fondaĵo	65905	65096
Volontula Fondaĵo	67276	69863
Fondaĵoj entute	525498	507428
Antaŭricevitaj rimedoj	144749	122213
Pagotaj kostoj	69105	72154
Pendantaj spezoj	4854	5967
Kreditoroj	1215354	1396610
Deponoj de membroj	760395	799881
Kreditoroj k.s. entute	2194457	2396825
Sumo de la pasivoj	4426978	4774959

Recenzo



Kiam *La Espero* sonis plej esperplene

Sen titolo (1904?). Ivan G. Ŝirjaev (1877-1933). Editoris Herbert Mayer kaj Ed Borsboom. Vieno: Pro Esperanto, 1995. 336 p. 24 cm. 48,00 gld.

Ĉu marmora statuo restas artverko ankaŭ se ĵus skulptite ĝi sinkas al marfundo kaj neniam plu estas vidata? Tiun konatan demandon de estetiko sugestas la malmergiĝo de *Sen Titolo*, preskaŭ cent jarojn post sia ekesto — se kredi la hipotezon ke temas pri nia plej frua originala romano, verkita antaŭ *La kastelo de Prelongo* (1907) kaj *Ĉu li?* (1908) de Vallienne. Prezente argumentojn pore kaj kontraŭe (sed konkludeme al jeso), editoro Mayer defias niajn filologojn.

Jen do unu el la Esperantujo ne maloftaj kazoj kiam kultura produkto ne sukcesas propra-tempe eniri la ĝeneralan kulturen fluon Esperantan, kaj montriĝas por la posteuloj kiel objekto historia. Ĉi-epoke ĝi ne plu kontribuos al la kohera kontinuo kultura, sed ĝi almenaŭ inspiru nian komunan konscion historian, nutrante ĝin per rakonto aŭtobiografia, de persona intimo, el la pioniraj tempoj de Esperanto.

Eĉ realisto kun koro hardita de movadaj seniluziigoj ne rezistos la etosan ĉarmon de *Sen titolo*, de epoko kiam letero el fremda lando provokis admirojn kaj suspektojn, kiam la sperto ke svedoj kaj rusoj interkompreniĝas per Esperanto ŝajnis eksterordinara, kiam *La Espero* sonis plej esperplene... kiam la Fina Venko ŝajnis senprokrasta. Tial radias ia sekulara religieco el la romano de pastro Ŝirjaev, kiun ni legas pagane, eble kun sopiro ree kredi. Dumlege kuntrenas nin simpatio por la adoleskulo Joĉjo, seminariano en Jaroslavl antaŭ 99 jaroj, kies jun-arda, misiista verbo propaganda malfermas al li iom post iom pordojn en socia klaso al kiu li alie ne havus aliron.

La fantazio de Ŝirjaev, jam elmontrita en la novelaro *La dormanta grafino* kaj la romaneto *La nova vivo* (ambaŭ 1993), scias lerte teksti rakontojn foje felietonecajn, kun sortoturnoj

pli-malpli kredeblaj. En ĉi tiu verko aŭtobiografie inspirita li ne bezonas tiom da imagemo, ĉar la viv-eventoj de la junuleto liveras pretan kadron. Laŭe de tiuj, ni atestas sinsekvon de studondaj kunvenoj, de seminaraj ekzamenoj (ĉu Joĉjo sukcesos?), de promenoj kun knabinoj (ĉu Olnjo aŭ



Ivan G. Ŝirjaev (fotografajo el *La Ondo de Esperanto*, 12/1911)

Sonjo lin ĉarmos?)... La rolantoj kaj figurantoj vive individuecas, sed necesas kono de la multtavola rusa socio tiutempa por plene kompreni iliajn agojn kaj manierojn.

La lingvaĵo kaj stilo de la romano apenaŭ perfidas la verko-daton, des malpli ke ili tempe kongruas kun ties temo. Sed, leginte sur p. 317 ke “la editoroj elektis... fari la necesajn etajn korektojn”, oni fariĝas iom suspekta, malgraŭ ilia certigo pri “plej granda singardo”. Laŭ ili, “eldoni la tekston sen ŝanĝoj... kontentigus la proksimume 30 sciencajn esplorantojn de la originala literaturo.” Povas esti. Tamen, indekso de la teksto-modifoj je la fino de la volumo ne ĝenus laikan leganton sed utilis por esploremulo.

István Ertl (Nederlando)

Foli- ume



• Nova scienca revuo

Eŭropa Jura Universitato JUSTO estis kunfondita de Gennadij Ŝilo (Ukrainio) kaj Liana Tuĥvatullina (Rusio), membroj de Akademio Internacia de la Sciencoj kaj kunaŭtoroj de *Jura vortaro*. EJU lanĉis dumonatan revuon, *Scienco kaj kulturo* (jara abono 24 usonaj dolaroj al la UEA-konto “gmsi-h”), kiun redaktas Vladimir Samodaj (redakcio: p/a G. Ŝilo, ak. 81, RU-103104 Moskva, Rusio). La ĝisnunaj kvar numeroj (po 48p, formato A5, kolora kovrilo) enhavas kontribuaĵojn de H. Frank, M. Gišpling, N. Gudskov, W. Günther, T. Papp k.m.a. pri esperantologio, juro, medicino, beletra kaj aliaj temoj.

• Moderna kroata teatro

Antologion de ĉi-jarcentaj kroataj unuaktaĵoj kompilas d-ro Branko Hečimović, estro de la Teatrolgia Instituto de la Kroata Akademio. Redaktata de Spomenka Ŝtimec kaj Zlata Flego, la verko atendeble aperos ĉijare, kun financa subteno de la kultura ministerio. Ĝi enhavos ampleksan bibliografion pri interligo de kroataj aŭtoroj kaj aktoroj kun surscenigoj en Esperantujo. (*Tempo*)

• Kelklinie pri...

Post kvinjara interrompo aperis nova, 168-paĝa duobla numero de *Evangeliaj Kajeroj*, kun kontribuaĵoj de V. Ošlak, A. Burkhardt, J. Tuinder, C. Piron, V. Benczik k.a., pri la ĉeftemo “Etiko”... Ĉesis aperi la komuna gazeto de nederlandaj esperantistoj, *Fenomeno*, sed ĝi tuj reviviĝis kiel *FEN-x*, membrogazeto de la landa asocio Esperanto Nederland... Ekde januaro 1996 *Literatura Foiro* estas redaktata de la bulgara teatristo kaj multflanka kultura aganto Ljubomir Trifonĉovski, kun teknika asisto de Kiril Velkov. La antaŭa redaktorino, Perla Martinelli, restas kiel arta direktoro... La germana junulara *GEJ-Gazeto* atingis sian 100-an numeron; la brita *La Verda Proleto* (antaŭe *The Worker Esperantist*) festis en aprilo sian 400-an; la hungara *Debrecena Bulteno* fariĝis 15-jara. Gratulon! ★

Laste aperis



Aĵoj kaj la sezonoj, La. Ulrich Becker (1958). Vieno: Pro Esperanto, 1996. 114p. ISBN 3-85 182-037-1. 23cm. Kun ses gravuraĵoj de Uday K. Dhar. Prozaĵoj el 1990-95, de plurfoja premiito de Belartaj Konkursoj. 21,00 gld.

Aventuro de Momo. La ringo de Momo. Jean-Pierre (1943) kaj Michel Cavélan (1947). Thaumiers: La KancerKliniko, 1996. 44p. 30cm. Interuniversa bildrakonto, "kies ajneko falas en ĉies okulojn". 16,50 gld.

Beleco de Merab, La (1983). Torgny Lindgren (1938). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1995. 80p. 21cm. Novelaro kies fono estas Norda Svedio en la unua duono de nia jarcento, kaj kiu "revokas iaman buŝan literaturon el rakontoj, blagoj, anekdotoj". 12,60 gld.

Bestareto / Kleiner Tierkreis. Rita Rössler-Buckel (1949) kaj Franz-Georg Rössler (1949). Dulingva. Paderborn: Esperanto-Centro, 1988. 60 p. ISBN 3-922570-54-2. 19x19 cm. Portretoj de 21 bestoj, en versoj kaj grafikajoj. 15,00 gld.

Dictionnaire de poche / Poŝvortaro. Français-Esperanto, Esperanto-Français. Paris: SAT-Amikaro, 1996. 34+91p. ISBN 2-9508809-2-4. 15cm. Taŭga por komencantoj. 10,80 gld.


En la realo troviĝas truo. Nuntempa sveda novelarto. Div. aŭtoroj. El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1996. 84p. 21cm. Dek du noveloj de ses aŭtoroj, el 1986-1994, kiujn karakterizas speco de magia realismo. 12,60 gld.

Eposoj el antikva Ugarito. El la ugarita trad. kaj komentis Donald Broadribb. Bakers Hill kaj Beverley: Bookleaf Publishing, 1995. 46p. ISBN 1-876042-00-1. 30cm. Tri eposoĵoj de ĉ. la jaro 1500 a.K. 16,20 gld.

Esperanto et le plurilinguisme de l'avenir, L'. Entretien avec Umberto Eco. István Ertl et François Lo Jacomo. Rotterdam: UEA, 1996. 25p. ISBN 0165-2524. 21cm. Docu-

ments sur l'Espéranto 27F. Kompleta teksto de intervjuo. 4,80 gld.

Historio de la universala lingvo Volapuko (1963). Johann Schmidt (1895-1977). El Volapuko trad. Philippe Combet. Courgenard: André Cherpillod, 1996. 29+21p. ISBN 2-906134-30-9. 21cm. Kun indekso de personoj, urboj, gazetoj, libroj kaj lingvoj menciitaj. 15,00 gld.



Akademiano Laŭlum transdonas al ni grandan ĉinan klasikajon. Ulrich Becker montras sian prozan forton per unua novel-kolekto.

Kajeroj pri Esperanto-Teatro. Zofia Banet-Fornalowa (1929). Mettmann: Alfred Conzeth, 1996 (3-a eld.). 88+36+108+40p. 21cm. "Skize pri Esperanto-teatro", "Universala Kongresoj kaj Esperanto-teatro", "Polaj aktoroj kaj Esperanto-teatro". Kun la suplementa broŝuro "Intervjuoj, recenzoj, artikoloj". 33,90 gld.

Korte Brochure over de internationale taal Esperanto (1896). El Esperanto trad. Jac. M. Vaz Dias. Esperanto Nederland, 1996. 32p. 21cm. Faksimila eldono de la unua nederlandlingva propaganda broŝuro. 12,00 gld.

Laboristaj kronikoj pri la hispana Esperanto-movado. Antonio Marco Botella (1921). Beauville: SAT-Broŝurservo, 1996. 144p. 21cm. Objektiva historio de la laborista E-movado en Hispanio. 19,80 gld.

Manuale di Esperanto. Bruno Migliorini. Reviziis R. Corsetti. Antaŭparolo de Tullio de Mauro. Milano: CoEdEs, 1995 (4-a eld.). 160p. ISBN 88-85872-04-2.

21cm. 12-leciona lernolibro laŭ gramatika metodo. 19,30 gld.

Mirrakontoj de Liaoŝhai. Pu Songling (1640-1715). El la ĉina trad. Laŭlum. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1994. 541p. ISBN 7-5052-0156-5. 21cm. Ilus. Bind. Kromkovrilo. Rakontaro de la plej granda klasika novelisto de Ĉinio. 36,00 gld.

Orpantolono, La. Laŭ Max Lundgren. El la sveda trad. kaj adaptis Bertil Nilsson. Skövde: Al-fab-et-o, 1996. 40p. 21cm. Romaneto pri knabo kies pantalon-poŝo produktas monon. La simpligita teksto uzas ĉ. 450 morfemojn. 8,40 gld.

Pluralogo. Vimala Devi. Thaumiers: La KancerKliniko, 1996. 79p. ISBN 84-921247-0-9. 21cm. Poeziaj miniaturoj. La unua Esperantlingva volumo de poetino-pentristino naskita en Goa (Bharato),



verkinta portugale, hispane kaj katalune. 16,50 gld.

Principidino Mary (1838). Miĥail Lermontov (1814-41). El la rusa trad. Nikolaj Danovskij. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1996. 71p. 20cm. La kerna novelo el la kvin-novela romano *Heroo de nia epoko*. De unu el la plej ŝatataj rusaj verkistoj. 9,00 gld.

Pruva ekzemplo de kvin sonetoj, en kiuj laŭvice estas ellasitaj la kvin vokaloj aŭ sonantoj (1784). A.F. [Alb. Frese] (1714-88). El la nederlanda trad. Wouter F. Pilger. Lelystad: Vulpo-Libro, 1996. 16p. ISBN 90-70074-40-0. 21cm. 3,90 gld.

Sep junaj aŭstralianoj (1892). Ethel Turner. El la angla trad. Ruth McGrath. Bakers Hill kaj Beverley: Bookleaf Publishing, 1995. 86p. ISBN 0-646-25010-8. 30cm. Ilus. La unua porinfana klasikajo aŭstralia. 36,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

LA NOVA REALISMO

de Bruno Vogelmann

185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto. Premio Degučĉi, Premio FAME. Tradukita en 26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj. El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro, pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.



• Bjelorusio:

Va-Bank donis Verdan Lumon

En la suplemento *Va-Bank* de la ĵurnalo *Komsomolskaja Pravda* (200 mil ekzempleroj en la tuta Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj), aperis favora artikolo pri Esperanto, post la vizito de ĵurnalistino al la junulara klubo Verda Lumo en Minsk. (*Spektanto*)

Verda Lumo organizis, kun la rusia junulara asocio SEJM, la 8-an festivalon "Esperanto — Lingvo Arta" de la 7-a ĝis la 10-a de marto en Minsk. Superatende multaj, ĉ. 80 e-istoj el 30 urboj de 7 landoj venis i.a. por aŭdi koncertojn de Maŝa Kočetkova, Griŝa Arosjev, Oleg Dadajev, Aleksandr Kovalj kaj de infana E-koruso el Mogiljov. Laŭreatoj estis Pavel Korotenko (1.), Igor Parŝin (2.) kaj Jorg De Mulder (3.) (*Spektanto*, M. Seleŝtov)

• Britio: Por ĉiuj aĝoj

28 infanoj en du aĝgrupoj (5-11 kaj 12-16 jaroj) ĝuis dum la 80-a Brita Kongreso de Esperanto (Saffron Walden, 5-8 apr.) propran kongreslibron kaj plenan programon, inkluzive de instrugrupojn por komencantoj, pentradon sur T-ĉemizoj, faradon de paperstrutoj, ludadon en infanorkestro kaj viziton al farmobieno. Por plen-kreskuloj proponis sin i.a. la monodramo *Zamenhof* de Jadwiga Gibczyńska kaj prelegoj de Agneau Belanyek, Marjorie Boulton, Don Lord kaj Krys Ungar. (I. Fantom, *Bulteno* de la Londona E-Klubo, *Heroldo*)

Ĝustigo

La intervjuo kun Umberto Eco, citita en majo (p. 90), okazis ne ĉe *radio Paris Première*, sed ĉe *Pariza kabla televid-kanalo* kun tiu nomo. Dirinte ke E-o ne fiaskis kaj ke "la kialo pro kiu iu lingvo sukcesas, estas ĉiam nedifinebla", Eco ankoraŭ aludis la egoismon de la registaroj kaj finis siajn vortojn jene: "La problemo de Esperanto ne dependas de Esperanto mem, sed de politikaj eventoj kiuj superas la volon de esperantistoj." (*JeunEspéranto*)

Bosnio-Katalunio: Urbestro pasport-servis en Sarajevo

Inter la 12-a kaj 15-a de marto, la urbestro de Sabadell (Katalunio), Antoni Farrés, kaj magistratano Fermi Vellbé vizitis Sarajevo. Tie kuniĝis reprezentantoj de diversaj eŭropaj urboj por inaŭguri t.n. Ambasadon de Loka Demokratio, centron por pliglatigi la kunlaboron inter tiuj urboj kaj Sarajevo. Farrés, kiu subtenas la projekton de Kataluna E-Asocio kaj E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (apr., p. 67) kaj interparolis kun Senad Ĉolić januare, petis al KEA peri ilian loĝadon ĉe privatuloj en Sarajevo por pli profunde konatiĝi kun la surloka situacio. Tio sukcesis rapide kaj senprobleme, dank' al la bosniaj esperantistoj, kiuj ankaŭ disponigis tradukistojn.

La vojaĝo por ĉiuj delegacioj preskaŭ fiaskis, ĉar alveninte al Sarajevo ili eksciis pri la ĵusa demisio de la urbestro Tarik Kupusović. La sabadelanoj tamen sukcesis pere de la esperantistoj interkonsenti pri diversaj projektoj, kiel entuziasme rakontis Farrés mem post sia reveno. Farrés, cetere, gastis en la dombloko kie loĝas la eksiginta urbestro kaj, kvankam Kupusović rifuzis renkonti la vizitantojn, ili sukcesis skribi komuniki kun li. (H. Alos)

• Germanio:

Laŭ-tagaj vegetaranoj

La 12-a Printempa Semajno Internacia (Duderstadt, ĉe la iama limo inter du Germanioj, 1-8 apr.) ofertis tradicie riĉan gamon de programoj: matene prelegojn kaj kursojn (ofte eĉ 6 paralele), posttagmeze ekskursojn, kaj vespere kulturajojn (kiel koncerto de la litova grupo Asorti). Infanoj povis libere kuri kaj amikiĝi en la agrabla kunvendo, kaj spekti, sub gvido de Stefan MacGill, la vidbendon *Mazi*. Notinde kaj imitinde: oni ne deklaris sin (ne)vegetarano por la tuta semajno, sed ĉiumatene voĉdonis por konkreta plado tagmeza. (C. Knabe)

Sur la foto de Jürgen Mertens, dekstre: geedzoj Chrdle prezentas moraviajn kantojn.



• Ĉinio: ĈEL 45-jara

La 21-an de marto pli ol 60 esperantistoj festis en Pekino la 45-jariĝon de Ĉina E-Ligo (ĈEL). Inter ili troviĝis CHAI Zemin, prezidanto de la subtena societo "Amikoj de Esperanto", CHEN Yuan, honora prezidanto de ĈEL, kaj CHEN Haosu, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Aliaj Landoj. ĈEL-prezidantino TAN Xiu-hu retrorigardis al la malebena vojo irita en 45 jaroj. Kelkaj kunsidanoj esperis ke ĈEL festos sian 50-jariĝon per okazigo de IJK kaj per UK en la postaj 5 jaroj. (SHI Xie)

• Pollando: Praktika utilo

La 28-a Tutpollanda E-Kongreso (13-18 julio, Gliwice) traktos la praktikan utilon de Esperanto. Kontakto "Esperanto", skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice; ☎ +48/32/315-284; ☎ 382-043; ✉ darekc@atos.iitis.gliwice.pl.

Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario

Harold FILLINGHAM (1909-1996) forpasis la 18-an de aprilo. Pli ol 20 jarojn delegito en Nottingham (Britio) kaj longtempa sekretario de la loka klubo, li verkis pri sia juneco aŭtobiografian libron en Esperanto, *Bulwell*.



Walter Francini

Walter A. FRANCINI (1926-1996) forpasis la 3-an de majo en San-Paŭlo. Li verkis i.a. *Esperanto sen antaŭjuĝoj* (1978), analizon de kritikoj kontraŭ Esperanto, kaj la portugallingvan biografian romanon *Doutor Zamenhof* (1984), tradukis plurajn verkojn spiritismajn kaj de la bonfara organizo Legio de Bona Volo, instruis Esperanton, kaj estis delegito pri edukado kaj homaranismo dum preskaŭ 30 jaroj.

Sun-Tae JONG (1948-1996), dumviva membro, antaŭe delegito pri domkonstruado, mortis la 29-an de marto en Kyongju (Koreio).

Ants LAUR (1899-1996), renoma kemiisto lerninta Esperanton en sia naskiĝlando Estonio en 1922 kaj aktiva en Montrealo ekde 1981, mortis komence de marto en Kanado.

SAKAMOTO Syōzi (1927-1996) mortis la 5-an de majo en Kawanisi (Japanio), kie li estis delegito. Aŭtomobila inĝeniero ĉe Daihatsu, li estis aktiva ekde sia esperantistiĝo en 1949, sed aparte post la emeritiĝo, kiam li en 1987 transprenis la sekretariecon de la grava regiona organizo Kansaja Ligo de E-Grupoj (KLEG) de MIYAMOTO Masao, kies disĉiplo li estis. Sakamoto redaktis (1951-1957) la KLEG-organon *La movado*, gvidis ĉ. 40 kursojn — i.a. preskaŭ ĉiufoje la intensan kursaron “Friska lernejo” — kaj organizis plurajn kongresojn japanajn kaj kansajajn. Li verkis la popularajn lernilojn *La teksto unua* kaj *La teksto dua* (1967 resp. 1971, pluraj eldonoj), kuntradukis *Japanaj malnovaj rakontoj* (1965), *Stranga kato* de Eroŝenko (1983) kaj *Postmilita japana antologio* (1988),

provizis per komentoj dulingvan eldonon de la Zamenhofa traduko *La gimnazio* (1988), kaj laste redaktis kvarvoluman *Verkoj de Miyamoto Masao* (1993-94). En 1993 li ricevis la plej altan distingon de la japana movado, la premion Ossaka.

Ezra Clark STILLMAN (1907-1995) mortis la 12-an de aprilo 1995 en Novjorko. Unu el la *Dekdu poetoj* (Literatura Mondo, 1934), ekde 1937 li membris en la direktoraro de IALA, la asocio kiu en 1951 publikigis la lingvoprojekton Interlingua.

Erik SVÄRD (1914-1996), E-aktivulo de pli ol 40 jaroj, delegito pri sindikatoj, forpasis en Malmö (Svedio).

Josef WESIAN (1915-1996) mortis en Graz (Aŭstrio) la 25-an de januaro. Membro de UEA ekde 1950, delegito pri instruado dum jardekoj, li reprezentis Aŭstrion en Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata (Beogrado, 1963), kaj mem organizis la duan tian eventon en Graz (1966). Li kunaranĝis la 9-an konferencon de Neŭtrala E-Movado en Graz (1983) kaj kunadaptis la Zagreban metodon por germanlingvanoj (1984).

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kovrilpaĝo.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

La Esperanto-informcentro de Federacio Esperanto de Bharato en Pune (Hindio) bezonas unu volontulon-spertulon por labori por Esperanto. La voluntulo bone sciu Esperanton,

prefere iom la anglan, kaj scipovu uzi komputilon. Loĝ- kaj manĝ-aranĝoj estas senpagaj. Interesitoj skribu al d-ro Abdul Salam, 5, Archana Corner, Sahyadri Park, Kondhwa, Pune 411 048, India; ☎+91/212/662-323.

Kiu juna paro interesiĝas transpreni Esperanto-Press? Sendu detalojn pri vi kaj via ĝisnuna Esperanto-agado al R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0. En septembro/oktobro mi probable estos en Eŭropo kaj povus viziti interesatojn.

La klubo La Espero (Lot. II.N. 56 bis Analamahitsy, MG-101 Antananarivo, Malagasio) deziras ĝemeliĝi kun alilandaj kluboj.

Judaismema universitat-edukita 43-jarulo deziras korespondi kaj persone amikiĝadi kun la same judaismemaj geesperantistoj el la tuta mondo. Mato Spekuljak, Oštarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ☎+385 1 335090.

La du hejmaj telefonnumeroj de David Petro Samgar, Beer-Ŝeva, Israelo, estas de nun: +972-7-6101768, +972-7-6440230.

Eŭropa kalendaro 1997-1998. Lernu ĉiutage unu vorton en Esperanto, en la latina kaj en 13 lingvoj de la Eŭropa Unio! La kalendaron laŭ la lernolibro *Ludu kun ni* de E. Formaggio kun ĉarmaj desegnaĵoj eldonos en junio Eŭropa Klubo Paderborn. Sur la dorsflankoj de la kalendarpaĝoj troviĝas la plej freŝaj informoj pri la Eŭropa Unio kaj detaloj pri ĝiaj membrolandoj kaj atendolandoj. La prezo estos maksimume 10 germanaj markoj. Ĝi povas malplialtiĝi, se venos multaj antaŭmendoj. Ne hezitu, antaŭmendu tuj ĉe: V. Barandovská, Kleinenberger Weg 16, DE-33100 Paderborn.



Johann Wolfgang Goethe



Hans Christian Andersen



Jean-Baptiste Poquelin "Molière"



Dante Alighieri



William Shakespeare



Henry James



Miguel de Cervantes



Murasaki Shikibu



Pablo Neruda

LA 23an DE APRILO ILI ESTAS KATALUNAJ



La 23an de aprilo, Shakespeare

estas kataluna. Kaj ankaŭ

Molière. Kaj Goethe, Dante,

Cervantes, Henry James, Neruda. Ĉiuj geverkistoj

de la mondo estas katalunaj. Danke al ĉies klopodoj,

ni atingis ke tre propra tradicio nia disvastiĝis tra

la tuta mondo. Ekde ĉi-jare la 23a de aprilo, tago

de Sankta Georgo, tago de la Libro kaj de la Rozo,

estas deklarita de Unesko Monda Tago de la

Libro kaj de la Aŭtorrajto. Ni gratulas ĉiujn!



Generalitat de Catalunya

(kataluna registaro)

LIA HEREDAĴO

Prof. d-ro Ivo Lapenna — dum preskaŭ 50 jaroj la plej granda figuro de la Esperanto-Movado — forpasis la 15-an de decembro 1987.

Multaj memoras la epokon, kiam li gvidis la Asocion, kaj ĉiuj povas profiti de lia postlasita, unika verkaro. Kiel mondfama juristo, elstaraj oratoro kaj verkisto, dediĉita historiisto, la kreinto de la moderna Esperanto-Movado kaj ankaŭ de la koncepto "Humaneca Internaciismo", li heredigis al ni daŭre valoregajn studojn, kiuj samtempe portretas la homon kaj la tutan Esperanto-Movadon.

Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj
1966. 152p. Suplemento al *Retoriko*.
Elokventaj oratoraroj pri la kultura valoro de Esperanto. 33,00 gld.

Retoriko
Kun Aparta Konsidero al Esperantlingva Parolarto
3-a eld. 1971. 294p. Tolbind.
Antaŭparoloj de R. Rossetti kaj G. Waringhien. Klasika verko pri la parolarto. 51,00 gld.

Esperanto en Perspektivo
Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo
Ĉefaŭtoro kaj ĉefred. 1974. 32+844p. Tolbind. Valorega manlibro, *necesa* por ĉiu esperantisto. Bedaŭrinde elĉerpita.

Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo
1952. 143p. Fundamentaj nocioj, lukto por la paco per juraj rimedoj, internaciaj organizaĵoj. 33,00 gld.

Hamburgo en Retrospektivo
Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en Universala Esperanto-Asocio
2-eld. 1977. 11+151p. *Suplemento al Esperanto en Perspektivo*. Bazita sur originalaj dokumentoj pri la eventoj dum la UK en Hamburgo 1974. 33,00 gld.

La Internacia Lingvo
Faktoj pri Esperanto
1954. 192p. Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo.

La Esperanto-organizaĵoj, iliaj celoj kaj laboro. UEA: historio kaj laboro. Elĉerpita.

Memorlibro pri la Internacia Jubileo Esperanto-Konferenco, Graz 1987 — Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo
Red. d-ro Klaus Perko, 1989. 168p. Inter la kulturaj studoj troviĝas la lastaj paroladoj de Ivo Lapenna kaj pluraj fotoj. 50,70 gld.

Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro
Red. 1960. 104p. Eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. Antaŭparolo de Ivo Lapenna. Elĉerpita.

Kritikaj Studoj Defende de Esperanto
Nefermita Letero al J. V. Stalin — Kelkaj Lingvistikaj Demandoj — Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado — Eraroj kaj Absurdaĵoj en Doktoreca Tezo
1987. 60p (grandformata). Kvar analizaj eseoj de la jaroj 1952-1984. 22,80 gld.

Juraj Terminologiaj Problemoj
Kun Aparta Konsidero al Esperantlingva Jura Terminologio
1987. 38p. 15,00 gld.

Por Pli Efika Informado
1974. 20p. Kolekto de 16 artikoloj en la revuo *Esperanto*. Tiel grava, ke UEA decidis represi ĝin kiel labordokumenton aldone al la "Principaro de Frostavallen". Elĉerpita.



**Mendu de la Libroservo de UEA.
Sesona rabato ekde tri libroj (iuj ajn titoloj).**